

# EL POPOLA ĈINIO

中國報道 1979 7





Plugado

## Disvolvo de Plurflanka Ekonomio

Huayankou-komunumo situas ĉe la suda bordo de Huanghe-rivero (Flava Rivero) en norda antaŭurbo de Zhengzhou, Henan-provinco. En la lastaj jaroj ĝi konstruis 5 elektrajn irigaciajn pumpstaciojn, 837 pontojn kaj kluzojn kaj fosis kanalon de 66 kilometroj, tiel ke ĉiu komunumano havas unu muon ( $1 \text{ muo} = 1/15 \text{ hektaro}$ ) da irigaciata kampo. Dank' al tio ĉiam pligrandiĝas la produktokvanto de grenoj kaj senĉese disvolviĝas plurflanka ekonomio.









Rikoltado de pomoj



Sur avenuo

Bela kamparo





Angulo de anasbredejo






Li Ruli

# Li Ruli kaj lia familio

Li Ruli kaj liaj edzino kaj filo studas skeleton.



La ĉinmedicina kuracisto Li Ruli estas estro de la Traŭmatologia Sekcio de la Ĉinmedicina Instituto de Jiangxi, membro de la Kvara Sesio de la Politika Interkonsiliĝa Konferenco de Jiangxi, labormodelo kaj avangarda laboranto de la provinco kaj esploristo de la Jiangxi-a Filio de la Ĉina Akademio de Sciencoj.

Li okupiĝas pri traŭmatologio jam 48 jarojn. Ankaŭ liaj edzino kaj plejaĝa filo estas traŭmatologoj, lia plejaĝa filino estas kuracistino de iu ŝtalfabro kaj la dua filino studentino de la Medicina Instituto de Jiangxi. Ankaŭ liaj bofilo kaj bofilino laboras en hospitalo kaj medicina instituto. Kiam paciento vizitis lian hejmon por peti helpon, liaj familianoj ofte faris zorgeman ekzamenon kaj kuracadon: la patro direktis la filon kaj la edzino helpis la edzon. Lia hejmo ja similas al malgranda ĉinmedicina hospitalo.

Li Ruli estas fame konata kuracisto. Li kolektis multajn sekretajn kaj popolajn receptojn, kiuj multe efikas en kliniko. Li gajnis arĝentan medalon donitan de la Higiena Ministerio de la Ŝtata Konsilantaro pro sia "Raporto pri 213 kazoj de kuracado de ostarompigo per ĉina metodo" kaj oferis al la popolo sian hereditan sekretan recepton de "kuracilo por rompitaĵoj".

En sia klinika praktikado de kelkdek jaroj Li Ruli akumulis riĉan sperton pri kuracado de rompitaĵoj. La diagnozo de li post ekzamenado per manoj konformas al tiu per X-radio. Li sola per la manoj povas ĝustigi deviajn artikolojn. Elirante el klinika praktiko li multe mildigis doloron de pacientoj per bandaĝoj por tiri rompitaĵojn, kaj tio estis varme akceptata de pacientoj. Dank' al lia kuracado plejparto de la pacientoj kun aĝo de 1 ĝis 80 jaroj povas restarigi normalan funkcion. Li estas multe respektata kaj laŭdata de la popolo pro sia alta tekniko kaj spirito de tutkora servado al la popolo.

Li Ruli prezentas sian sperton al siaj kolegoj.








Li Ruli en drogherba ĝardeno



Li Ruli en kuracado



En parko



Li Ruli instruas spadoluktarton al sia filino.



# EL POPOLA ĈINIO

中國新道

1979

N-ro 7

(250)

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

Generala distribuanto: Guozi Shudian P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

## SUR LA KOVRILO:

P. 1. Taja kaj lahua virinoj

P. 4. Lotusfloro (Ĉinstila pentraĵo)

de LI KUIZHENG



## Enhavo

Infanoj kaj patrinoj sub prizorgo . . . . .	2
Datong-karbominejo hodiaŭ . . . . .	6
En la tagoj ĉirkaŭ la fondiĝo de Hubei Esperanto-Asocio . . . . .	11
Refoje pri la Suzhou-a Esperanto-Grupo . . . . .	14
Profunda funebro . . . . .	17
Lando de kameloj . . . . .	21
TRA ĈINIO: Belaĵoj de Chengde . . . . .	24
En la hejmloko de Tria Franjo Liu . . . . .	27
Alkoholaĵo de pli ol 2200 jaroj . . . . .	30
Junaj legantoj de la Beijing-a Biblioteko . . . . .	31
Rapidkalkula metodo de Shi Fengshou . . . . .	34
Intervjuo de plongistoj . . . . .	36
Kiel manĝi (poemo) . . . . .	39
Giĉeto (Novelo) . . . . .	40
Pri Armand Su . . . . .	44
AMIKECO: Ĉie troviĝas niaj amikoj . . . . .	46
INTER NI: Kunlaboro floras en la nova rubriko . . . . .	48
ESP-NOVAĴOJ . . . . .	49
KURANTAJ AFEROJ . . . . .	10, 45, 50
Abelo-gelato el floroj . . . . .	52

# Infanoj kaj patrinoj sub prizorgo

**E**N la sezono de streĉa printempa plugado, ni faris vizitadon al Xinhui-gubernio sur la Delto de Zhujiang-rivero en suda Ĉinio. La gubernio estas fame konata pro sia bona sanprotektado al virinoj kaj infanoj. En tiu regiono kun reto de riveroj estas multaj akvokampoj, la komunumanoj estis en streĉa transplantado de rizplandidoj. Grupoj de junpioniroj kun ruĝaj koltukoj iris sur montojn por planti arbojn.

Xinhui estas fama kreskejo de palmoj. Ambaŭflanke de la vojoj staras vicoj de palmoj kaj tie kaj tie kreskas palmaj arbaroj. El la larĝaj palmofolioj oni povas fari ventumilojn kaj plekti matojn kaj korbojn, kaj tiaj tradiciaj metiartaĵoj estas bone akceptataj de eksterlanda merkato. En la gubernia urbo, ĉie kreskas verdaj banjanoj, altaj kateĉuoj, milan-arboj (*Aglaia odorata*) kun aromaj floroj, bananarboj kaj liĉiarboj. Kaj inter la verdaĵoj, plej okulfrapaj estas la kapokarboj kun ruĝaj floroj. Ĉio tio donas al la urbo aspekton de subtropika natura florigardeno.

Norde de tiu bela urbo sin trovas la Sanprotektejo por Virinoj kaj Infanoj de la gubernio. La du estrinoj de la institucio varme akceptis nin. Ili prezentis al ni la sanprotektan laboron por virinoj kaj infanoj en la tuta gubernio: En Xinhui loĝas 800,000 popolanoj, inter kiuj estas 400,000 virinoj kaj 101,000 infanoj kun aĝoj de nepli ol 7 jaroj. En la komenca periodo post la Liberiĝo, Xinhui jam estis la gubernio de Guangdong, kiu plej frue ĝeneraligis la novan akuŝan metodon. En tiu gubernio nun troviĝas 185 akuŝistinoj, 173 nudpiedaj kuracistinoj kaj 130

sanprotektejoj por virinoj kaj infanoj de produktaj brigadoj kaj formiĝis unuapaŝe sanprotektareto en la niveloj de gubernio, komunumoj kaj brigadoj por virinoj kaj infanoj. 149 profesiaj oficistoj direktas la laborojn de la sanprotektaj institucioj. Post la prezentado ni decidis viziti unu produktan brigadon.

Ni veturis per buso de la gubernia urbo suden kaj post 35-kilometra kurado atingis Nanhe-brigadon de Yaxi-komunumo. Tiu estas brigado de meznivela produktado kun 1,137 membroj. Inter ĝiaj 422 laborkapabluloj sin trovas 286 virinoj. Kamarado He, kiu akompanis nin, diris, ke en tiu loko oni povas rikolti trifoje en ĉiu jaro, kaj la virinoj devas labori tutjare. La virinoj devas plenumi penigan taskon, tial la sanprotektala laboro por virinoj kaj infanoj estas aparte grava por tiu loko.

*Sur tobogano*






Veninte al la vilaĝfino, ni renkontis kuracistinon Zhong Jinbao, kiu estis iranta al lernejo por fari injektadon al la lernantoj por preventi B-tipan encefaliton, kaj kune kun ŝi ni venis en la lernejon. Vidinte ŝin, la geknaboj varme salutis ŝin. La instruisto vokis la lernantojn laŭ la nomlisto, kaj la lastaj laŭvice etendis sian brakon por injekto. La pli ol 60 geknaboj de la grupoj de la 8- kaj 11-jaruloj ĉiuj ricevis injekton en malpli ol unu horo. Jinbao diris al ni, ke tia injektado por preventi malsanojn estas farata plurfoje en ĉiu jaro kaj la bezonataj vakcino kaj medikamentoj estas senpage liverataj. Poste ni iris kun ŝi al la higiena stacio de la brigado. En tiu stacio laboras du nudpiedaj kuracistoj, kaj Zhong respondecas pri la sanprotekta laboro por virinoj kaj infanoj. La stacio situas en la centro de la vilaĝo, proksime de la hejmo de Zhong, kaj ŝi estas ĉiam preta por doni helpon al malsanuloj. La interna ĉambro de la stacio servas kiel akuŝejo, en kiu troviĝas du litoj por akuŝado kaj ripozado de virinoj post akuŝo. Apude de la litoj kuŝas bonorde pakajoj de necesajoj por akuŝistino kaj pesilo por mezuri la korpopezon de novnaskitaj beboj.

Sur la muroj de la ekstera ĉambro pendas diversaj tabeloj pri ekzamenado de gravedaj virinoj kaj novnaskitaj beboj, kaj ankaŭ kartoj pri la sanŝtato de la vilaĝanoj, kiuj prezentas detalan kaj zorgan registron. Jinbao diris al ni, ke la brigado zorge plenumas sanprotektan laboron al la virinoj dum menstruo, gravedo, akuŝo kaj

mamnutrado kaj taskas ilin per konvenaj laboroj. La gravediĝintaj virinoj meminitate iras al la stacio por sin registri, kaj 5 ĝis 7 ekzamenoj estas farataj al ili dum la lastaj 4 monatoj antaŭ la akuŝo, kaj se oni trovas nenormalaĵon kaj antaŭvidas kazon de malfacila akuŝo, la gravediĝinta virino devas esti frue sendita al la kuracejo de la popola komunumo aŭ gubernio por sekura akuŝado. Tiu stacio trovis kvar kazojn de fetoto en nenormala situo kaj ĝustatempe ilin korektis kaj evitigis al la virinoj malfacilan akuŝon. Komunumano Zhang Shangwen suferis de kutima abortado, sed je la kvara gravediĝo, ŝi ricevis kuracadon kaj konsilojn de la stacio kaj sekure naskis bebon. Ŝia familio tre ĝojis pro tio. Nun ŝi jam havas filon kaj filinon kaj mem postulis naskobridon.

Jinbao diris al ni ankaŭ, ke en la periodo de la unuaj 28 tagoj post la naskiĝo de la beboj, al ili facile okazas mortodanĝero, tial ili bezonas zorgan flegadon. Pro tio, en la sekvanta tago post la elhospitaliĝo de la akuŝistinoj, ŝi jam ilin vizitis por pririgardi la novnaskitojn kaj doni ĝustatempan medicinan helpon en la hejmo laŭ bezono. Kiam la bebo de Li Fuzuo naskiĝis, oni trovis, ke la umbilika ŝnuro ĉirkaŭis ĝian kolon, tial ili observadis ĝin du horojn post traktado. Noktomeze, la novnaskito vomis, Jinbao do faris ekzamenon ĝustatempe kaj elsuĉis la malpuraĵon el ĝia buŝo. Kaj poste, ŝi vizitis la pacienteton ĉiutage por ekzameno kaj post certa-tempa flegado ĝi saniĝis.

*Kuracistoj kontrolas epidemioimunan efikon al infanoj.*



Sane kreskas ĉiuj 139 infanoj naskitaj post 1972, en kiu ili komencis praktiki la sistemon de sanprotektado al la akuŝintinoj kaj ekzamenado al la novnaskitoj. La relative bona sanprotektala laboro al la infanoj akcelis la disvolviĝon de la naskobrida laboro. En 1978, ĉiuj 12 novaj beboj de la brigado estis naskitaj laŭplane. En tiu jaro, la loĝantaro de tiu brigado kreskis nur je 0.78%.

La brigado Nanhe fondis unu infanĝardenon kaj kvar infanvartejojn por bone prizorgi la infanojn de 40 tagoj post ilia naskiĝo ĝis ilia ekvizio de elementa lernejo. Antaŭe, la infanoj petoladis kaj kaŭzis akcidentojn pro manko de prizorgantoj antaŭ sia eniro al elementa lernejo. Iuj falis de sur arbo pro serĉo de ovojn en birdaj nestoj kaj rompitis al si membrojn, aliaj persekutis porkojn per pintigitaj bambustangoj imitante injektadon, triaj dronis en akvuojn, kiuj estas multaj en tiu loko, kaj ankoraŭ iuj bruligis domojn pro fajroludo. Post la fondo de la infanĝardeno kaj infanvartejoj, la gepatroj povas labori trankvile.

Kiam ni venis al la infanĝardeno, la infanoj ĝentile nin salutis: "Bonan tagon, geonkloj!" La infanĝardeno instaligis en iu malnova alta domo, hela kaj bone aerumata. Ekster la domo estas placo por ludado. En ĝi troviĝis 75 infanoj kun aĝoj de 4 ĝis 7 jaroj, kiuj estis dividitaj en du grupojn. En tiu tago, du junaj vartistinoj donis al ili lecionojn pri pentrado kaj ĉina lingvo. Krom la menciitaj lernoobjektoj, estas instruataj en la infanĝardeno ankaŭ kalkulado, metiarto kaj muziko. La instruaj materialoj redaktitaj de la eduka buroo de la gubernio taŭgas por kamparaj infanoj.

En la infanĝardeno laboras profesiaj servantoj, kiuj prizorgas la kuiradon, tualetadon kaj higienon por la infanoj.

La sanprotektan laboron de la infanvartejoj kaj infanĝardeno prizorgas Jinbao. Ŝi vizitadas ilin kaj helpas la vartistinojn starigi administran sistemon kaj instruas al ili sciojn pri infanvartado. En ĉiu jaro, ŝi ekzamenas, je fiksa dato, la sanstaton de la vartistinoj kaj infanoj. Foje, ŝi trovis askaridajn makulojn kaj palan koloron sur la vizaĝo de iuj infanoj. Ŝi do portis ilin al la

komunuma hospitalo por ekzamenado. Oni trovis, ke iuj el ili suferas parazitadon de askaridoj kaj aliaj nesufiĉecon de sangokoloraĵo. Ŝi tuj raportis tion al la brigado kaj ties respondeculoj tuj sendis nutrozajn manĝaĵojn al la infanĝardeno. Ekzameno post 6 monatoj al tiuj infanoj pruvis, ke ilia sangokoloraĵo atingis la normon. Kaj la suferantoj de askaridoj ricevis ĝustatempan medicinan helpon por ekstermi la parazitojn. La gepatroj de tiuj infanoj estas tre kontentaj pri la bona prizorgo de Zhong al la infanoj.

La infanvartejoj prizorgas infanojn kun aĝoj de 40 tagoj ĝis 4 jaroj, kaj ĉiu vartistino prizorgas 3 aŭ 4 infanojn. Por ke la mamsuĉantaj beboj kun aĝoj de malpli ol unu jaro povu ricevi nutradon de sia patrino, ili elpensis multajn rimedojn. Ekzemple, vartistinoj sendas la bebojn al iliaj patrinoj en laboro je fiksita tempo por mamnutrado, kunportante desinfektitajn mantukojn por ke la patrinoj viŝu la mamojn antaŭ mamsuĉigo.

La infanvartejoj kaj infanĝardeno ĉiumatene faras ekzamenon kaj se oni trovas epidemion, oni tuj izolas la pacientojn por doni ĝustatempan kuracon, tial neniam disvastiĝis epidemio en ili dum la lastaj jaroj.

20 procentoj de la loĝantaro de Nanhe-brigado estas lernantoj de elementa kaj mezgrada lernejoj. Por bone protekti la sanon de tiuj geknaboj, la kuraca stacio kaj la lernejoj bone kunlaboras. Specialaj instruistoj estas taskitaj pri zorgado pri la higiena laboro de la lernejoj. En ĉiu semajno, nudpieda kuracisto donas lecionon pri higieno al la geknaboj. Foje, por vekti atenton pri la pureco de la manoj, oni lavis la malpurajn manojn de iu lernanto, prenis guton el la malpura akvo por esploro sub mikroskopo. Dank' al tia montro pri ekzisto de bakterioj, la lernantoj ekkomprenis la neceson de pureco. Ankaŭ per la helpo de mikroskopo oni komprenigis al la geknaboj pri la neceso trinki nur boligitan akvon. Tia instruado efikis tre bone. Nun la lernantoj jam alkitimiĝis al trinkado de boligita akvo kaj lavado de la manoj antaŭ preno de manĝo. Jinbao ankaŭ donis specialajn lecionojn al knabinoj mezlernejaj pri sanprotektado dum la adoleskanteo.




*Malgranda  
orkestro*



La lernejoj kaj la kuraca stacio ankaŭ organizis la instruistojn kaj lernantojn por disvolvi patriotan higienan movadon por purigi la medion utiligante semajnfinajn postlecionajn horojn. Kaj krome, la lernantoj prizorgas ankaŭ la purigan laboron de sia hejmo. La lernejoj sendas kontrolojn je fiksita dato al la domoj de la lernantoj por kontrolo, kaj la bone purigitaj en ili estas honore titolitaj kiel "higienaj domoj".

En la sezono kiam facile disvastiĝas epidemioj, la nudpiedaj kuracistoj kaj higienaj laborantoj kolektas drogherbojn surmonde, preparas dekoktaĵon kaj ĝin disdonas al la loĝantoj por preventi malsanojn. Kaj Jinbao portis dekoktaĵon al la infanvartejoj, infanĝardeno kaj lernejoj. Ricevinte vakcinojn kaj medikamentojn de la Epidemiopreventa Stacio de la gubernio kaj la hospitalo de la komunumo, oni povas ilin apliki al la membroj de la brigado en unu aŭ du tagoj. En 1976, kiam kazoj de gripo kaj morbilo aperis en najbara brigado, en Nanhe-brigado aperis neniua kazo. En la lastaj dek jaroj, en la brigado ne aperis kazo de infanparalizo, krupo, B-tipa encefalito, tifo kaj malario, dank' al bona preventado.

Komunumanoj de la brigado diris, ke la sanprotekta laboro faris certan kontribuon al la disvolviĝo de la agrikultura produktado de la brigado en la lastaj jaroj. Jinbao diris al ni, ke la atingoj de ilia laboro estas nedisigebla de la subteno de la supera instanco. Kuracistoj de la provinca kaj gubernia institucioj ofte venas al ili



*Danco kun Ruĝa Si krubando*

por doni konsilojn pri disvolvo de sanprotekta laboro, starigi sanprotektan sistemon kaj fari statistikojn. La pediatria fako de la gubernia hospitalo, kiu vaste traktas infanajn kazojn de la tuta gubernio, ofte atentigas al la brigado pri sanprotekta laboro, laŭ rimarkitaj punktoj ĉe la kliniko. Antaŭ nelonge, la ĉefkuracisto de la pediatria fako de la provinca hospitalo kaj la tri veteranaj estroj de la sanprotekta institucio de la provinco venis al la brigado por kontroli ties higienan laboron, kaj donis siajn konsilojn por plibonigi ties laboron.

En la tago, kiam ni revenis al la gubernia urbo, kuracistoj alsenditaj de la provinca hospitalo estis farantaj ĝeneralan ekzamenon pri raktismo al la infanoj. Kiel multe da medicinaj laborantoj sin okupas por la sano de la infanoj en la kamparo!



*Laboristoj de Datong-karbominejo*

TIANSHEN:

# DATONG-KARBOMINEJO HODIAŬ

**A**NTAŬ nelonge, ni veturis norden per vagonaro trans la Granda Muro al la urbo Datong, kie estas nia karboprodukta bazo kun grandegaj rezervo kaj produktokvanto de karbo.

En la vagono ni hazarde renkontis tri karbominejajn teknikistojn veturantajn al Datong kaj ekbabiladis kun ili. Kaj la parolo nature turniĝis al ilia ŝatata temo pri karbo, energia fonto kaj avangardaj teknikoj.

“Estas vere, ke la karbo produktita de multaj aliaj lokoj ne donas tiel fortan fajron kiel tiu produktita de Datong. Kaj krome, la Datong-a karbo entenas malmulte da sulfuro kaj cindro kaj oni povas prepari el ĝi bonkvalitan koakson per

enmikso de altglueca karbo. Kaj pro tio oni nomas la karbon de Datong ‘fajna nutraĵo’ por peza industrio.” Diris unu el la tri kunvojaĝantoj. “Ĝuste pro tio, la ŝtato nun estas konstruanta ĉeminejan termoelektron kun kapacito de 1,200,000 kilovatoj.” Alia mezaĝulo nomata Granda Li diris kun brilo en la okuloj. “Multaj specialistoj opinias, ke la karbotavoloj de Datong estas aparte dikaj kaj tre taŭgaj por permaŝina ekspluatado.”

“Kamarado Ĵurnalisto, ĉu vi ofte eniras ŝaktojn?” Granda Li sin turnis al mi kaj demandis.

“Tion mi faris antaŭ longe. Tiam ministoj devis bori truon, eksplodigi minojn kaj elporti



Stala galerio



karbon nur post malapero de la fumo de dinamito.” Mi ekmemoris la pasintaĵon kaj diris: “La fostoinstalitoj devis mezuri per siaj okuloj por decidi la longecon de la fostoj, kaj iu maljuna ministro diris al mi, ke li devis trovi danĝerojn per siaj oreloj por eviti katastrofon. Kredeble, ĉifoje mi vidis novajn teknikojn en la minejo.”

Kaj nia interparolo turniĝis al modernigo, ni parolis pri enkonduko de fremdlandaj ekipaĵoj kaj pri enlande produktitaj maŝinoj por karbofosado.

### **KLOPODOJ POR MODERNIGO**

Alveninte al Datong mi aŭdis kaj vidis multajn multajn impresajn aferojn. En tiu loko, moderna Yanzishan-karbominejo kun jara produktokvanto de 5,000,000 tunoj estas jam konstruata. Kaj ĉiutage pli ol 1,500 vagonoj portas karbon al 19 provincoj kaj urboj.

En la administracia domo de la minejo, mi vidis vicĉefingenieron Liu Erkang, kiu ĵus revenis de ŝakto. Li studis minadon en universitato kaj diplomitiĝis antaŭ 27 jaroj. Tiu teknikisto diris al mi, ke en la 12 grandaj ŝaktoj de Datong iom post iom efektiviĝas sinteza meĥanizo de karbofosado. Li klarigis al mi: “La sinteza meĥanizo de karbofosado signifas plenumi karbofosadon, karbotransportadon kaj subtenadon de

galeria plafono per modernaj maŝinoj. Ni devas klopodi por modernigo laŭ la nova teknika nivelo de la mondo.” Li diris al mi, ke sesono de la karbo ekspluatata de Datong-karbominejo estas eltirita per sinteza meĥanizita metodo. Ekde 1974, la totala jara produktokvanto de la minejo kreskas ĉiujare je 1,500,000 tunoj. Ĉiu el la lignaj kaj metalaj fostoj uzitaj en la pasinteco povis elteni nur premon de 30-45 tunoj, dum la nuna hidraŭlika subtenilo de la tipo Datong IV povas elteni premon de 600 tunoj. Kaj krome instaligis ankaŭ bonaj enlande produktitaj maŝinoj por karbofosado kaj nilonrimenaj transportaj maŝinoj.

Post lia prezento, mi vizitis interesplene 3 parojn da ŝaktoj kaj propraokule vidis ministrojn laborantajn per modernaj maŝinoj en sekcio aplikanta la novan metodon. Dank’ al ilia laboro, la subtera nigra oro senĉese torentas supren por servi al la popolo.

### **LERTAJ MAŜINOJ**

Galopadas la elektra vagonaro sub direktado de la stiristo laŭ la ordono de la direktejo ricevita per ondporta telefono. Ni veturis per ĝi en la 4-an oblikvan ŝakton. La karbomuro de la 100 metrojn longa sekcio de la Unua Laborgrupo de sinteza mekanika karbofosado estis hele prilumata de neonlampo. Tie laboris importita kar-

bofosa maŝino kun ruliĝanta cilindrego, kies akraj dentegoj demordis karbon je rapideco de 4 metroj en ĉiu minuto, kaj karbopecoj faladis sur la rubandan transportan maŝinon. En ĉiu deĵoro ĝi povas produkti 180 tunojn da karbo, t.e. duoble tiom ordinara maŝino produktas.

La vicŝaktestro Maljuna Zhu gvidis min tra la larĝa galerio al la laborsekcio de la Dua Laborgrupo de sinteza mekanika karbofosado. En tiu loko, unu enlande produktata du-cilindra fosmaŝino estis en lerta laborado. Tuj post kiam la giganta maŝino antaŭen moviĝis, mi rimarkis kun miro, ke ekiris ankaŭ la hidraŭlikaj subteniloj de la tipo Datong IV, kiuj formis longan ŝtalan koridoron. Ĉiu el la subteniloj havas kvar ŝtalan fostojn kun dikeco de piedpilko. Dank' al apliko de tiaj subteniloj, la ministoj povas sekure labori sub la ŝtona plafono kaj ne plu bezonas sin gardi de falantaj ŝtonoj. En la pasinteco, multaj homoj devis okupiĝi pri starigo de subtenaj fostoj kun penego, dum nun du laboristoj jam sufiĉas por manipuli la subtenilojn per regantaj valvoj.

Tiu enlande fabrikita moderna ekipaĵo memorigis al ni ĝian projektanton eminentan inĝenieron Li Xueqian.

Antaŭ dekkelkaj jaroj, Li Xueqian venis al Datong. Vidinte subtenil-laboristojn plenumantajn pezan kaj danĝeran laboron kun longtenila martelo, li tre maltrankviliĝis kaj komencis cerbumi por krei hidraŭlikan subtenilon. Dum multaj jaroj li diligente legadis koncernajn librojn kaj laboris kune kun ministoj por kolekti materialojn kaj spertojn.

Foje, apenaŭ provfaritaj subteniloj estis instalitaj, okazis plafona premo kaj ĉe la tuta laborsekcio aŭdiĝis tondra bruado. Malgraŭ malkonsilo de laboristoj, li restis en la ŝakto por observadi la subtenilojn por ilin perfektigi poste.

## PAGO DE LERNOKOSTO

Dum mia vizito al la minejo de Datong, mi ofte estis kortuŝita de la plena sindediĉo de la inĝenieroj kaj laboristoj en la konstruado de la karbominejo. Ili multe klopodas por bone utiligi la enkondukitajn eksterlandajn teknikojn laŭ la ĉinaj lokaj kondiĉoj. Mi vidis iun importitan karbofosan maŝinon, kies tranĉilaj dentoj estis

anstataŭigitaj per pioĉo-formaj dentoj por demordi malmolan karbon. Kaj ili ankaŭ disvastigis la sperton de enpumpo de akvo al malmola karbotavolo por faciligi la fosadon kaj samtempe malhelpi disflugon de karbopulvoro. En tiu loko, oni diligente lernadas por mastri avangardajn teknikojn kaj ekipaĵojn, bone ilin apliki, ilin renovigi kaj reformi laŭ lokaj kondiĉoj kaj eĉ projekti novajn maŝinojn, tial ili diras, ke por ili aĉeto de fremdlandaj teknikoj kaj ekipaĵoj signifas pagon de lernokosto. Inter la historioj pri pago de lernokosto, plej forte min kortuŝis tiu pri la renovigo de fosmaŝino fare de laboristoinĝeniero Mao Amao.

La problemo de fosmaŝinoj estis malfacile solvebla problemo en Datong-karbominejo. La minejo importis avangardajn fosmaŝinojn, tamen ili ne taŭgis por la malmola karbotavolo de Datong. Inĝeniero Mao Amao de la tria ŝakto legis fremdlandajn teknikajn desegnaĵojn kaj decidis provfari specialan maŝinon por fosi malmolan karbon.

Por projekti maŝinparton, kiu devas plenumi movojn antaŭeniri, labori kaj retroiri, li tute absorbiĝis kaj foje eĉ faris jenan ridindaĵon:

Iutage, li enpaŝis sian domon, kutime ĵetis sian ĉapon sur la ŝrankon, eklevis sian kapon kaj stuporis, ĉar en la ĉambro troviĝis juna geedza paro. Li absorbiĝis en cerbumado kaj erare eniris alies domon!

Fine, li estis inspirita de la ir-reira relo de tranĉiltenilo de iu speciala ilmaŝino kaj solvis la problemon.

Dum provuzo de la nove farita fosmaŝino en galerio, oni trovis ke likvo tralikiĝis el la maŝino. Li trovis solvon de tiu problemo el la kontraŭlika rimedo aplikata al injektilo de flegistino.

En la tria ŝakto, mi rigardis la novan fosmaŝinon akompanate de Inĝeniero Mao. Mi vidis, ke ĝi laboras facilmove kaj rapide. Ĝi estas malpeza, facile riparebla, taŭga por demordi malmolan karbon kaj ĉiutage povas fosi 30 metrojn.

En kontaktado kun Mao Amao kaj aliaj avangardaj laborantoj kaj laboristoj mi pensis pretervole, ke la energio de karbo estas kalkulebla, sed la sindonemo de la renovigistoj similaj al



Mao Amao en modernigo de la karbominejo estas nekalkulebla.

## PATROJ KAJ FILOJ DE MINISTA FAMILIO


Dum nia vizito al la kvara ŝakto, iu gvidanta kadro Fan Jin rakontis al mi jenan okazaĵon, parolante pri la administrado:

“Malgranda Chen, la estro de la Unua Laborgrupo de sinteza mekanika karbofosado raportis al ni je skipoŝanĝo, ke la direktisto de fosmaŝino de la antaŭa skipo malobservis la regularon en manipulado de la maŝino. Ni faris kontrolon en la ŝakto kaj konstatis, ke li raportis la veron. Por rigore efektivi la administran sistemon pri produktado, ni kritikis la nomitan skipon kaj la direktisto de la maŝino faris memkritikon.”

“Kaj la nomita maŝindirektisto estas neniu alia ol la junulo Li Guixiang, kiun vi jam vidis en la ŝakto.” Maljuna Fan daŭrigis: “Kompreneble tio okazis antaŭ tri jaroj. En la lastaj jaroj la junulo ĉiam bonege plenumis siajn taskojn, meminiciate helpis aliajn en riparado de la ekipaĵoj kaj fariĝis elstara teknikisto. En la pasinta jaro, ilia grupo superplenumis la produktan taskon difinitan de la ŝtato kaj Malgranda Li ricevis sumon da mono kiel premion!”

Oni diris al ni, ke la progreso de Malgranda Li estis akirita dank’ al helpo de siaj kamaradoj kaj la edukado de sia patro Li San, kiu estas veterana karboministo. Iutage, mi vizitis la patron de Li Guixiang en iu etaĝa domo de la minejo. Lia hejmo troviĝas en apartamento konsistanta el tri bone meblitaj helaj ĉambroj, kiuj estas bone aranĝitaj kun honoraj diplomoj ricevataj de la patro kaj filo sur la muroj. En vitrita kadro montriĝis foto pri la mastro, farita antaŭ nelonge dum lia ripozado en sanatorio ĉe Beidaihe.

Li San estas preskaŭ 50-jara kaj sur lia veteruŝita vizaĝo jam aperis sulkoj. Mi informiĝis de li, ke en la malnova socio, li laboris, kun siaj patro kaj pliĝa frato, kiel infana laboristo ĉe karbominejo de kapitalisto. En tiu tempo, ĉiutage ili devis elporti el la malluma ŝakto 15 korbojn da karbo kaj per sia ŝvito akiris ŝiman farunaĉon en kvanto ne sufiĉa por vivteni la ses membrojn de ilia familio. Multaj malsanaj labo-



*Ekspluatado de karbo*



*Li Guixiang (meze) kun siaj avo kaj patro*

ristoj estis ĵetitaj de la kruelaj ĉefoj en komunan tombokavegon kaj multaj viktimiĝis en disfalo de mineja galerio.

Nur post la Liberiĝo, ili komencis feliĉan vivon. La ministroj iom post iom liberiĝis de

pezaj kaj danĝeraj korpaj laboroj. La galerioj estas bone ventolataj kaj ĉiu persono en ili povas ricevi ĉiuminute 4 kubmetrojn da freŝa aero. Tio estis tute neimagebla en la estinteco.

Li diradis senĉese: “Mi laboris en la komenco kiel mineksplodigisto, poste kiel direktisto de karbofosa maŝino kaj nun kiel maŝin-riparisto.

Ankaŭ mia filo jam komencis manipuli karbofosan maŝinon. Mia patro estas emeritiĝinta ministro kun aĝo de 78 jaroj. Li ofte esprimis bedaŭron, ke li ne povis uzi grandajn maŝinojn. Hodiaŭ ni havas tiel bonajn kondiĉojn kaj la ŝtato tiel bone zorgas pri ni, ni devas labori ankoraŭ pli bone.”



*Laboristo-inĝeniero Mao Amao (la tria de maldekstre) esploras, kune kun laboristoj, la fosmaŝinon projektitan de li mem.*




## NOVA FERVOJO

La fervojo de Taiyuan (Tajjuan) ĝis Jiaozuo, interliganta la nordan kaj centran partojn de Ĉinio, estas finkonstruita kaj oficiale malfermiĝis al trafiko je la unua de aprilo.

La fervojo kun totala longeco de ĉ. 400 kilometroj komenciĝas de Xiuwen-stacio, sude de Taiyuan, de la Datong-Puzhou-a Fervojo kaj finiĝas je Jiaozuo de Henan-provinco. Ĝia suda parto longa je 188 kilometroj estis finkonstruita en la 60-aj jaroj. Kune kun la in-

terligitaj Jiaozuo-Zhicheng-a kaj Zhicheng-Liuzhou-a Fervojoj la Taiyuan-Jiaozuo-a Fervojo formis novan trafikajn aorton paralelan al la Beijing-Guangzhou-a Fervojo. Ĝi faciligas al nia lando fervojan trafikon, altigas la elportan povon de karbo de Shanxi (Ŝanhi) kaj favoras disvolvon de la loka ekonomio.

*La fervoja ponto super Zhangherivero*





# En la tagoj ĉirkaŭ la fondiĝo de Hubei Esperanto-Asocio

**L**A fondkunveno de Hubei Esperanto-Asocio okazis la unuan de majo en la urbo Wuhan. Oni invitis alilokajn esperantistojn por partopreni en la kunveno, kaj pro tio ankaŭ mi havis ŝanĉon ĝin ĉeesti kiel gasto.

Kiam la trajno atingis la urbon, mi trovis pli ol dek esperantistojn junajn kaj maljunajn sur la perono, kiuj venis por nin bonvenigi. Inter la maljunuloj estis profesoro Xue Chengzhi (Seĉencz) kaj kamarado Kang Taizhang, kiuj estas ambaŭ 73-jaruloj kiel mi, kaj kun kiuj mi fondis lokan grupon la Hankou-an Esperanto-Asocion antaŭ 50 jaroj.

Nun ĉe la okazo de la fondiĝo de la Hubei Esperanto-Asocio ni denove renkontiĝis. La ĝojo estis nepriskribebbla kaj ni havis sennombrajn aferojn por preparoli, komparante la nunajn tagojn kun la malfacilaj jaroj sub la reakcia regado de Kuomintango. Inter la bonvenigantoj estis ankaŭ samideanoj el aliaj lokoj, kiuj venis al la loko pli frue ol ni kaj kun kiuj mi havas korespondajn rilatojn sed ankoraŭ ne havis ŝanĉon renkontiĝi. Tio estis ankaŭ tre plezura por mi. Unuvorte la varma kaj ĝoja sceno estas por mi neforgesebla.


Hubei Esperanto-Asocio (HEA)

estas akceptita kiel membro de la Federacio de Filozofiaj kaj Sociologiaj Asocioj de Hubei-provinco kaj metita sub ĝia gvidado. La ĉefa respondeculo de la federacio kamarado Mi Jiafan tre favore subtenas la fondiĝon de HEA, ĉar li mem iam lernis iom la lingvon kaj bone scias pri la skribaĵo de Prezidanto Mao pri Esperanto. Li havas bonan komprenon pri la lingvo, kvankam li poste forlasis la lingvon pro plena sinokupo pri revoluciaj laboroj.

La fondkunveno havis lokon en salono de la gastejo, kie la gastoj tranoktis. La kunvenejo estis or-

*La ĉeestantaro de la inaŭgura kongreso de Hubei Esperanto-Asocio*





*Ekspozicio de Esperantaj libroj*

namita simple sed ne monotone. Sur muroj estis pendigitaj eldiroj de Prezidanto Mao, Ĉefministro Zhou Enlai kaj Vicĉefministro Chen Yi kaj tiuj de Lusin kaj M. Gorki. Krome estis ankaŭ poemoj mane skribitaj kaj flagoj, kiujn alsendis alilokaj esperantistoj kaj Esperantaj grupoj.

La fondkunvenon malfermis profesoro Xue Chengzhi kun mallonga festoparolado. Post li k-do Mi Jiafan, la respondeculo de la nomita federacio, faris sufiĉe longan paroladon, en kiu li esprimis varman bonvenon al la gastoj, kiuj speciale venis de foraj lokoj, laŭdis la gloran historion de Esperanto-movado de la loko kaj instigis la novan asocion fari ankoraŭ pli grandajn kontribuojn en la estonteco.

La kunveno ricevis pli ol 70 gratulajn leterojn kaj telegramojn el Beijing, Shanghai, Sichuan, Heilongjiang, Jilin, Jiangsu, Zhejiang, Shanxi, Shaanxi, Gansu, Henan, Interna Mongolio kaj Guangxi. En la kunveno alparolis preskaŭ ĉiuj gastoj kaj parolis ankaŭ multaj el la membroj.

La kunveno aprobis principe la projekton de la statuto proponitan de la prepara komitato. Mi Jiafan estis elektita kiel honora prezidanto de la asocio. Oni elektis naŭpersonan konsilantaron, en kiu troviĝas Xue Chengzhi (prezidanto), Xia Bangxing, Sun Zhen-ou (viceprezidantoj), Li Jun (sekretario) kaj Zhang Danchen (vicesekretario).


Fine estis deklamado de poemoj kaj ĥora kantado de Esperantaj

kantoj. La kantadon plenumis ĥoro formita el gejunuloj, kiuj komencis lerni Esperanton apenaŭ antaŭ duonmonato, sub direktado de Zhu Yi, maljunulo, kiu komencis lerni la lingvon antaŭ du monatoj.

Dum la daŭro de la kunveno regis etoso plena de fervoro kaj vigeleco. Ĝi estis granda kuraĝigo al ĉiuj ĉeestantoj. Ĉar la gastoj el aliaj lokoj ĉiuj loĝis en la sama gastejo. La junaj esperantistoj profitis la okazon por interŝanĝi sperton de lernado kaj ekzerci la lingvon. En neniun nokton oni enlitiĝis antaŭ duono post la 11-a horo. En iu nokto oni eĉ disiris al siaj dormoĉambroj nur je la duono post la 3-a horo en sekvinta mateno.

Post la kunveno oni aranĝis du-tagan ekskurson por la alilokaj





*Ĝoja renkontiĝo de tri 73-jaraj esperantistoj*



*Alilokaj geesperantistoj ĉe la Orienta Lago*

gastoj, al la malnova budhisma templo Guiyuan Chansi en Han-yang kaj al la pitoreska Orienta Lago en Wuchang. Preterire la ekskursantoj vizitis la Historian Muzeon de Hubei-provinco, kie estis ekspoziciataj la lastajare elfositaj historiaj kulturaj objektoj el antikva tombo de la tempo antaŭ pli ol 2,400 jaroj. Pri tiu elfoso nia gazeto jam raportis en la n-ro 2. p. 42. Sed estas malofta ŝanco por ili vidi propraokule la objektojn mem. Vespere oni spektis la prezentadon de la Wuhan-a Akrobata Trupo, kiu estas fama en kaj ekster la lando.

Kvin tagojn ni restis en Wuhan, kvin tagojn plenajn de ĝojo kaj plezuro. Kiam mi skribas ĉi tiujn liniojn post reveno al Beijing, regas en mia koro ankoraŭ varmo kaj emocio. Ĉar la travivaĵo estis por mi neniam spertita, tute malsimila ol mia ĉiutaga rutina Esperanta vivo.

*Sur la centra muro de la kunvenejo*





*La Suzhou-a Esperanto-grupo*

# *Refoje pri la Suzhou-a Esperanto-grupo*

de XIAO PING

**D**EPOST kiam nia revuo raportis, en la dua numero, la fondiĝon de la nomita grupo, multaj legantoj petis doni plian informon pri ĝi. En la mezo de aprilo mi vizitis la grupon kaj agrable pasigis unu semajnon kun tieaj geesperantistoj.

## **BELA REMEMORO**

Alveninte al la urbo Suzhou, mi unue renkontis mian konatan esperantiston Kamaradon Zenston. Li longe laboris en nia redakcio, emeritiĝis antaŭ kelkaj jaroj kaj revenis al sia hejmloko. Kvankam li jam estas 75-jara, tamen li restas same fervora al la Esperanta afero kiel antaŭe. La grupo estis iniciatita kaj fondita ĝuste de li kaj alia maljuna esperantisto Hang Li antaŭ unu jaro. Estas interese, ke antaŭ pli ol 40 jaroj ili

jam kune sin okupadis pri Esperanto-movado dum kvin jaroj.

La Suzhou-a Esperanto-movado havas sufiĉe longan historion. Frue en la jaroj 1915 kaj 1923 jam funkciis unu post alia Esperanto-kursoj en la urbo. Ekde la tridekaj jaroj plivigliĝis Esperanto-movado tie. Tiam la nombro de la esperantistinoj de la urbo estis eĉ pli multa ol tiu de Shanghai (Ŝanhajo).

Kamaradoj Zensto kaj Hang detale rakontis al mi pri la tiama movado. En la jaro 1930 Zensto fondis Esperanto-kurson en la biblioteko de Suzhou-parko kaj elkulturis nombron da esperantistoj. Kaj en la sekvinta jaro ili starigis la Suzhou-an Esperanto-Asocion. En la postaj jaroj, krom daŭre funkciigi la kurson, ili kom-



pilis kaj eldonis legaĵojn «Esperanto Unuhora», «Esperanto en Dek Lecionoj» ktp. Nelonge post tio Hang kaj aliaj esperantistoj malfermis felietonon “Stela Lumo” en la gazeto «Tagiĝo» por speciale konigi Esperanton. Pli poste la asocio partoprenis en la movado de la latiniga skribo de la han-a lingvo kaj eldonis la libreton «Nova Han-a Lingvo». Tiu libreto ne nur propagandis la signifon kaj bonojn de latiniga skribo de la han-a lingvo, sed ankaŭ ellaboris novan projekton de norda kaj Suzhou-a dialektoj. Krome ili akceptis la sloganon elmetitan de la Ĉina Proleta Esperantista Unio “Per Esperanto por la Liberigo de Ĉinio” kaj aktive partoprenis en la progresema movado por savi la patrujon el pereco. Ili eldonis periodaĵojn, okazigis kunsidojn kaj faris stratan propagandon por malkaŝi la agresajn krimojn de la japana imperiismo kontraŭ Ĉinio kaj oponi kontraŭ kapitulaco kaj kompromiso de Kuomintango. Kvankam la reacia registaro de Kuomintango detruis kaj subpremis foje kaj foje la Suzhou-an Esperanto-Asocion, tamen ĝi persistis en la Esperantaj laboroj ĝis kiam la urbo estis ekokupita de japanaj imperiistoj.

### REVIGLIĜIS ESPERANTO-MOVADO

En la dua tago post kiam mi atingis la urbon, mi estis invitita al la printempa ekskurso aranĝita de la grupo. Mi kaj pli ol 30 membroj de ĝi kune vizitis la plej antikvan parkon Canlangting en la urbo. Ĝi havas historion de pli ol 1,000 jaroj kaj ĉiam tenas sian renomon.

En tiu tago estis milda zefiro kaj ĉarma suno. Ekskursis ne nur maljunaj sed ankaŭ multaj junaj geesperantistoj. Plejparto de ili estas laboristoj, instruistoj de mezaj kaj elementaj lernejoj, poŝtovicistoj kaj komizoj de magazenoj. Dum la ekskursado ili ĝoje kantis, deklamis poemojn, interŝanĝis sperton en lernado de Esperanto kaj raportis pri la Esperanto-movado en kaj ekster la lando. Tiaj aktivadoj jam estis kelkfoje okazigitaj de la grupo.

Estas menciinde, ke je la 25-a de junio pasintjare okazis kunsido por diskuti, kiel ĉinaj esperantistoj faros sian kontribuon por modernigi sian patrujon per Esperanto en la nova periodo. Heredante la gloran tradicion de la ĉina Espe-



*Ili interparolas Esperante.*



*Esperantistino Zhang Ying deklamas poemon.*

ranto-movado, ili elmetis la sloganon “Per Esperanto por la Modernigo de Ĉinio”. Kun tiu celo ili lernas kaj uzas Esperanton. Observante la principon ili nun estas kompilantaj Esperantan gvidlibron pri Suzhou, sin preparante por akcepti eksterlandajn esperantistojn, kiuj vizitos la urbon. Samtempe ili faras korespondadon kun la celo pliigi la amikecon inter la ĉina kaj alilandaj popoloj.

Krom la supre menciitaj aktivadoj ili ankoraŭ starigas kolektivajn kaj individuajn rilatojn kun enlandaj Esperanto-organizaĵoj kaj esperantistoj.

Lastatempe nombro da junuloj de aliaj lokoj skribis al la grupo por peti Esperantan lernolibron, kaj iuj ankaŭ petis permeson aliĝi al ilia grupo esperante ricevi helpon en la lernado. Al ili la grupo donis varman helpon.

Je la 15-a de decembro pasintjare ili okazigis memor-kunvenon por celebri la 119-an datrevenon de la naskiĝtago de Zamenhof. En la kunveno oni raportis pri la vivo de Zamenhof, retrorigardis la historion de la Esperanto-movado kaj parolis pri ĝia perspektivo, interŝanĝis serton en studado de Esperanto kaj deklamis poemojn de Zamenhof.

### PONTO DE AMIKECO

Depost kiam Esperanto eniris Ĉinion en la komenco de la kuranta jarcento, ĝi servadas kiel la ponto de komunikado kaj amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj aliaj landoj. En la lastaj sesdek jaroj ĉinaj esperantistoj raportis al diverslandaj esperantistoj la revoluciajn batalojn de la ĉina popolo kaj la realan staton de la nova Ĉinio kaj ĝiajn atingojn en konstruado, kaj faris sian kontribuon por interkompreno kaj amikeco inter nia kaj alilandaj popoloj.

Malnova Esperantisto Hang Li prezentis al mi kelkdek leterojn kaj poŝtkartojn senditajn de eksterlandaj amikoj antaŭ 44 jaroj. Tiam li

korespondis kun esperantistoj de Belgio, Francio, Aŭstrio, Pollando, Bulgario, Sovetunio, Koreio, Birmo, Italio, Germanio kaj Nederlando. Li ĉiam bone konservas tiujn korespondaĵojn, ĉar ili estas simbolo de amikeco inter li kaj alilandaj esperantistoj.

En la jaro 1933 okazis jena neforgesebla afero: Iu hungara esperantisto vizitis la urbon kaj ricevis varman akcepton de Zensto kaj Hang. Ili kune aprecis vidindaĵojn de la urbo kaj iris al vilaĝo por ĉeesti geedziĝan ceremonion de paro da kamparaj gejunuloj. Ili kune pasigis proksimume 20 agrablajn tagojn.

Mi ĝoje vidis, ke nun restariĝas tiaj amikaj aktivadoj. Ekde marto de la kuranta jaro la grupo ricevis leterojn el Jugoslavio, Japanio, Francio, Finnlando, Svedio, Italio, Kanado, Anglio kaj aliaj entute pli ol dek landoj. Iuj gratulis ilin pro la fondiĝo de la grupo; aliaj petis starigi rilaton kun ĝi por pli multe informiĝi pri Ĉinio; kaj triaj esprimis sian ĝojon pro la atingoj kaj progreso akiritaj de Ĉinio. Tio montris, ke esperantistoj de diversaj landoj havas profundan amikecon por la ĉinaj popolo kaj esperantistoj. Ĉiuj membroj de la grupo kredas, ke Esperanto kiel lingva ponto certe plifortigos la rilaton, solidarecon kaj amikecon inter la ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj.



*Ili legas leteron kaj gazetojn senditajn de fremdlandaj esperantistoj.*



Venlo Fon  
hejme (1977)



LIU LING KAJ HOU ZHIPING:

## PROFUNDA FUNEBRO

**K**AMARADO Venlo Fon, respektinda ĉina Esperanta pioniro, laboradis konsciencie dum pli ol kvardek jaroj, por disvastigi Esperanton en Ĉinio kaj plifortigi al alilandaj esperantistoj la komprenon pri la popolo de Ĉinio. Ni neniel povas kvietiĝi, rememorante lian revolucionan optimismon strebi spite al maljuneco, lian stilon labori fervore kaj solide kaj liajn senlacajn lernadon kaj instruadon. Li jam forpasis, tamen restas liaj voĉo kaj mieno, kvazaŭ li ankoraŭ sidus kune kun ni super la laboro kaj lernado.

### DUM LA KRIZO DE LA PATROLANDO

K-do Venlo Fon naskiĝis la 23-an de junio, 1901. En sia juneco li studis agronomion en

Jinling-Universitato de Nanjing (Nankino). Sed li ne finis sian studon kaj eklaboris kiel instruisto en mezgrada lernejo.

En 1937, la japanaj imperiistoj komencis agresan militon kontraŭ Ĉinio. La kapitulacemo de la Kuomintanga reakcia registaro ebligis al la malamiko rapide okupi vastan teritorion de nia patrolando. Ankaŭ la naskoloko de K-do Venlo Fon — gubernio Zhuoxian, provinco Hebei, estis okupita. En la kriza momento li ekpensis pri sia estonteco. Informiĝinte pri la kontraŭjapana kaj nacistava politiko de la Komunista Partio de Ĉinio, li iris al Xi'an, urbo proksima al la kontraŭjapana bazo Yan'an. Li konatiĝis kun Xu Shouzheng (Eltunko), respondeculo de la tiama

Xi'an-a Esperanto-Societo, kaj sin ekligis al la Esperanto-movado.

Printempe de 1938, K-do Venlo Fon iris al la urbo Tianshui, provinco Gansu, kaj laboris kiel instruisto en mezgrada lernejo, kie li fervore gvidis Esperantan kurson kaj propagandis la kontraŭjapanan militon. Baldaŭ li konatiĝis kun du subteraj laborantoj de la Partio, servantaj en la urba poŝtejo. Dank' al tio li povis ofte legi librojn kaj gazetojn sekrete senditajn el Yan'an. Por povi labori en la liberigita regiono, li skribis leterojn al amikoj laborantaj en Yan'an. Atendante respondon, li subite ricevis leteron de sia pliaĝa frato, kiu vokis lin al la Sudokcidenta Unuiĝinta Universitato en la urbo Kunming, provinco Yunnan. Al li ŝajnis, ke Kunming proksimas al Xianggang (Hongkongo), kaj tial estas oportune kontakti kun tieaj Esperantaj amikoj, kiuj okupiĝis pri eldonado de "Voĉoj el Oriento"; kaj estos bonege, se venos ŝanco iri al Xianggang kaj labori kun ili en la kontraŭjapana propagandado per Esperanto.

## EN LA KORESPONDA ESPERANTO-LERNEJO

Aŭtune de 1939, li ekveturis al Kunming. Survoje, en la urbo Chongqing (Ĉongking), li renkontiĝis kun Ĵelezo kaj aliaj progresemaj esperantistoj. Ĵelezo diris, ke li restu por kune fondi Korespondan Esperanto-Lernejon.

Post la fondiĝo de KEL, li aktive gvidis E-kursojn kun aliaj samideanoj, kaj koresponde instruis Esperanton al diverslokaj lernantoj tra la tuta lando. Kaj krome ili ankaŭ eldonadis esperantaĵojn.

Tiam ilia laboro estis tre malfacila. La Kuomintang-registaro ne nur ne subtenis ĝin, sed ankaŭ ĉiamaniere limigis la eldonadon kaj disdonadon de Esperantaj libroj, kaj eĉ alsendis spionojn por subfosi kaj gvati. Por eviti bombadon fare de japanaj aviadiloj, ili devis transloĝiĝi en vilaĝon kaj poste reveni al la urbo. Leviĝadis la prezoj, kaj ili, sen salajro, sin vivtenis nur per malmultaj kotizoj kaj honorarioj por kontribuoj al la Esp-a gazeto "Heroldo de Ĉinio". Ĉiutage ili prenis nur du manĝojn. Dum ses jaroj K-do Venlo Fon ne havis monon por aĉeti ves-

tojn. Kiam lia vesto truiĝis, li mem ĝin flikis; kiam la ŝuoj eluziĝis, li surmetis pajlosandalojn anstataŭe; ne havante monon por pagi veturkoston, li piediris.


Kvankam la vivo estis tiel malfacila, tamen li rigardis la suferon kiel honoron kaj laboradis por KEL kun entuziasmo neniam spertita de li. Li mem kompilis gramatikan lernolibron, serioze instruis, detale korektis ekzercojn. Poste, li kompilis la "Plenan Vortaron Esperantan-Ĉinan" en pli ol 3 jaroj. Li diris: "Por Esperanto mi volonte oferus la vivon!" Kortuŝite de lia entuziasmo kamaradoj intime titolis lin "Nia Majstro".

En 1940, en gazeto "Yan'an-a Esperantisto" aperis la manskribo de Prezidanto Mao pri Esperanto. Legante liajn vortojn K-do Venlo Fon estis forte inspirata. Helpe de Ĵelezo, Xu Shouzheng, Zeng Heyao kaj aliaj esperantistoj, li ofte legis progresajn librojn kaj gazetojn kaj sciigis multe pri la enlanda kaj internacia situacio. Li vidis la fakton, ke la patrolando estis dismembrigata kaj samlandanoj masakrataj kaŭze de la kapitulacisma linio de Kuomintang, kaj nur la Oka-voja Armeo, gvidata de la Komunista Partio de Ĉinio estis persiste batalanta kontraŭ la agresantoj por liberigi la ĉinan nacion. Li decidis fari ĉion eblan por la patrolando gvidate de la Partio. Li dissendis kun aliaj samideanoj diversloken la gazeton "Yan'an-a Esperantisto" eldonitan en la liberigita regiono, sekrete transsendis flugfoliojn, kiuj malkovris la veron pri la "Evento en Suda Anhui-provinco", kiel reakcia trupo de Kuomintang surprizatakis la Novan Kvaran Armeon, popolan armitan forton kontraŭjapanan. Interalie li multe esperantigis, por "Heroldo de Ĉinio", artikolojn el "Jurnalo Xinhua" kaj aliaj progresaj gazetoj pri la kontraŭjapana batalo de la tuta popolo kaj pri perfortaĵoj de japanaj agresantoj. Li tradukis ankaŭ verkojn de Lusin. Iuj el liaj tradukaĵoj aperis en "Literatura Mondo".


En Chongqing li konatiĝis kun la esperantista paro Liu Ren kaj Verda Majo kaj ricevis multan helpon de ili.

La laboron de Venlo Fon laŭdis Kamarado Dong Biwu, unu el la gvidantoj de la Suda Buroo





*Kamarado Venlo  
Fon en juneco*



*Venlo Fon (dekstre) inter-  
parolas kun sia amiko (1954).*

de CK de KPĈ. Kamarado Dong invitis lin al la oficejo kaj parolis, dum kunmanĝo, multe pri la en- kaj eksterlanda situacioj, kuraĝigis lin teni firman fidon pri la nepra venko, diligente lerni, solide labori kaj unuiĝi kun ankoraŭ pli multaj esperantistoj. De tiam li energie laboris kun pli granda memfido.

Post la venko en la kontraŭjapana milito li forlasis Chongqing aprile de 1946 kaj iris al Zhangjiakou en la liberigita regiono sub la gvido de KPĈ. Komenciĝis lia nova vivo.

### SENLACA ĜARDENISTO

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, favorigis la kondiĉoj por Esperanta laboro kaj aperis nova situacio por la Esperanto-movado.

En 1950 ekaperis la gazeto "El Popola Ĉinio" kun Venlo Fon kiel sia ĉefredaktoro. La 11-an de marto, 1951, ĈEL deklaris en Beijing sian establiĝon, kaj Venlo Fon estis elektita kiel membro de ĝia Konstanta Komitato. Tuj sekve ĈEL eldonis dekojn da Esp-aj libroj inkluzive de la "Elementa Kurso de Esperanto" kompilita de

li, kaj reeldoniĝis lia "Plena Vortaro Esperanta-Ĉina".

En 1962, Radio Pekino preparis Esperantan disaŭdigon. K-do Venlo Fon, kvankam jam pli-ol-60-jara, prenis iniciative sur sin la taskon treni ties laborantojn. Post la komenciĝo de la disaŭdigo li laboris kiel poluristo.

Julie de 1963, en Beijing okazis kunsido kaj ekspozicio pri la Esperanta laboro. Vicĉefministro Chen Yi ĉeestis la kunsidon, vizitis la ekspozicion kaj faris tre kuraĝigan paroladon. Li laŭdis la atingojn en la Esperanta laboro kaj instrukciis, ke oni energie disvolvu tiun laboron. Laŭ tiu instrukcio junaj instruistoj el 11 superaj lernejoj en diversaj lokoj de la lando kolektiĝis en Beijing por lerni Esperanton. Ilin instruis Venlo Fon. Post unu jaro ili revenis al siaj lernejoj kaj ekinstruis Esperanton.

En aŭtuno de 1964, la Eduka Ministerio direktivis funkciigi en la Beijing-a Brodkasta Instituto Esperantan kurson por 20 fremdlingvaj studentoj venigitaj el 5 superaj lernejoj. Vidante, ke la ŝtato tiel alte taksas la Esperantan laboron, li tre ĝojis kaj stimuliĝis. Por bone instrui aron post

aro da lernantoj, li dediĉis la tutan koron kaj la tutan energion. Li pacience konigis al la lernantoj la perspektivon de Esperanto, prezentis al ili la rolon de la internacia lingvo dum la revoluciaj militoj en nia lando, parolis pri la direktivo de Prezidanto Mao Zedong rilate la Esperantan laboron kaj montris la signifon de partopreno en tiu laboro. Multaj lernantoj forte kortuŝiĝis de lia senlaca instruado kaj decidis bone ellerni Esperanton.

Kamarado Venlo Fon havigis al si riĉan speranton en multjara instruado. Li sciis kiel laŭcele instrui lernantojn por malsamaj laboroj en estonteco. Ekz, al tiuj, kiuj estis laborantaj ĉe Radio Pekino, li emfazis la parolan lingvon; dume li turnis la atenton de tiuj, kiuj estis fariĝontaj tradukistoj, al fundamenta ekzercado pri traduko. Dum leciono li ofte instigis lernantojn levi demandojn kaj kuraĝigis ilin respondi en Esperanto. Unu el liaj lernantoj jam laborinta multajn jarojn, diris: “Majstro Fon estis afabla, fervora kaj facile alirebla. Li zorgeme kaj pacience instruis nin. Kiam ni iom progresis, li ĝojis multe pli ol ni mem. Nun ni ofte rememoras lin sopire.”

Kalkulite de la jaro 1939, li instruis Esp-on al pli ol dumil kursanoj, kiuj nun laboras diversloke en la tuta lando. Multaj honoras lin per la titolo Senlaca Ĝardenisto en Esperantujo.

### KRIPLIĜO PLIFIRMIGIS LA VOLON

K-do Venlo Fon havis ĉiam junulan viklecon kaj serenecon. Ĉiutage, en ĉia vetero, li biciklis al la laboro. Iam li aŭdacis eĉ rivali kun junuloj, bicikle ekskursis al Monto Xiangshan, dekojn da km. fore de Beijing. Oni plurfoje lin admonis: “Vi jam transpasis la sojlon de sesdek jaroj, kaj la okuloj terure miopas, lasu la biciklon.”

“Ne!” li diris, “biciklado hardas kaj la korpon kaj la volon, jen duobla efiko. Mi deziras vivi pli da jaroj, por servi al la popolo.”

Sed malfeliĉe, iun fruan matenon printempe de 1970, lia biciklo surveturis ŝtoneton kaj li falis teren. Post ekzameno en hospitalo oni konstatis, ke la dekstra fibulo rompiĝis. Iom resaniĝinte li jam volis labori. Li diris humure: “La kapo ne vundiĝis, ĝi ankoraŭ povas labori.”

Post la akcidento li malfortiĝis. Kun miriga volo li venkis malfacilojn, ĉiutage sin ekzercis en paŝado, helpe de lambastonoj.

Lin atakis pneŭmonito kaj poste pulma emfizemo. Post tio li tiel malfortiĝis, ke ĉiu paŝo lin dolorigis kaj ŝvitigis. Malgraŭ tio li obstine piediradis al la laboro, sin apogante sur bastonoj. Kamaradoj admonis lin, ke li laboru hejme, sed li diris: “En la oficejo mi povas vivi kaj lerni kune kun la kamaradoj kaj oportune respondi demandojn elmetitajn al mi.” Li sciis, ke li maljuniĝis kaj jam ne povos longe servi al la patrolando, tial li laboris ankoraŭ pli diligente.

### PLENUMIĜIS LA PLEJ GRANDA ASPIRO

K-do Venlo Fon estis ĉiam rigora al si kaj klopodis por progresi en politiko. Dum dekoj da jaroj li laboradis sinforgese. En la aĝo de 73 jaroj li aniĝis al KPC. Tio igis lin multe pli vigan kaj energia. Tiam li estis poluranta la Esp-ajn tradukaĵojn de la “Elektitaj Verkoj de Mao Zedong” kaj aliaj libroj. Li decidis oferi siajn lastajn jarojn al la revolucia afero.

Foje li diris al sia familiano: “Mia plej granda aspiro estas esperantigi kun k-do la ‘Elektitajn Verkojn de Mao Zedong’.” Por plenumi sian juron li laboris dek horojn en iuj tagoj. Lia edzino admonis kun larmo, ke li iom ripozu, tamen li diris: “Mi maljuniĝis, laboras malrapide, sen pli longa laboro ne povus plenumi la taskon.” Dank’ al la kuna penado de li kaj aliaj kamaradoj, la 1-a — 4-a volumoj de la “Elektitaj Verkoj de Mao Zedong” en Esp-o sukcese eldoniĝis. Post tio li sidadis ĝis la forpaso super polurado de “Sekvi Vicprezidanton Zhou dum la Longa Marŝo” kaj aliaj libroj.

En sia funebra poemo lia edzino skribis jene:

*“Por la laboro pene strebis lia koro,  
Por lernantoj viglis li en nokta horo.”  
“Kvankam malsana, li plenumis sian taskon,  
Post la kripliĝo plifirmiĝis lia volo.”*

Tio estas vera resumo de lia vivo.

K-do Venlo Fon jam forpasis, ni profunde funebras pro li! Ni lernos lian revolucionan spiriton kaj daŭrigos la servadon per Esperanto al la ĉina popolo kaj la monda popolo.





de CHEN RINONG

**N**I ekveturis okcidenten de Yinchuan, la ĉefurbo de la Ningxia-a Huj-nacieca Aŭtonoma Regiono en norda Ĉinio, kaj transpasinte Helan-montaron eniris la vastan stepon de Alxazuoqi. Verda paŝtejo punktita de buntaj floretoj etendiĝas malproksimen. Aŭtuno estas ora sezono sur la stepo por grasigi la brutojn. Sur la “verda tapiŝo” paŝtiĝas sennombraj gregoj da ŝafoj kaj ĉevaloj. Momenton poste, ĉe la horizonto aperis multaj nigraj punktoj. Kiam nia aŭto alproksimiĝis al ili, ni trovis, ke ili estas kameloj. Iuj el ili senĝene manĝis herbon kaj aliaj kun longe etenditaj nukoj rigardis nian aŭton per brilaj okuloj.

60% de la areo de tiu hoŝoo (gubernio) estas kovrata de dezerto. En la hoŝoo oni bredas milionon da ŝafoj, bovoj kaj ĉevaloj, kaj pli ol 146,000 kamelojn, kaj tiu nombro estas kvarono de la totala nombro de kameloj en la tuta lando. Tial la gubernio ricevis alian nomon Lando de Kameloj.

La hoŝoo plejparte kaj ofte suferas de sekegeco kaj furioza sablovento. Tie ĉi estas tre froste en vintro kaj varmege en somero, tial la loko ne taŭgas al agrikulturo. Tie estas malmulte da herboj kaj la ĉefaj plantoj estas arbedoj kaj arbustoj malaltaj kaj maldensaj kun mallarĝaj kaj dornaj folioj. La naturaj kondiĉoj de tiu loko malfavoras al bredado de brutoj, sed kameloj povas bone vivi en tiu loko. Kameloj ŝatas manĝi tieajn maldelikatajn, dornajn, fortodorajn kaj salalkalajn vegetaĵojn kiujn aliaj brutoj ne volas manĝi.

Dum la lastaj tridek jaroj, dank’ al la subteno de la ŝtato kaj komuna klopodo, la paŝtistoj trovis akvo-fontojn, faris forstumadon por bridi sablon kaj konstruis herbejojn, tial la brutobredado ricevis bonan disvolvon. Nun la nombro de kameloj 3.5-obliĝis kompare kun tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo. La paŝtistoj ĉiujare povas vendi al la ŝtato meznombre 550,000 kilogramojn da kamela lano, 210,000 kilogramojn da kamela viando kaj multe da kamelaj feloj.

### TRINKADO ĈE LA “FONTO”

Dum la vizitado nin akompanis Namujilemuce, estro de la hoŝoo brutobreda buroo. En sia infanaĝo li jam komencis paŝti por brutoposedanto kaj estas multe hardita en la vivo. Nun tiu mongola kadro ankoraŭ frekventas paŝtejojn kaj bone konas kamelo-bredadon. Li estas malkaŝema kaj parolema. Li diris al ni, ke nun estas sezono por grasigi kamelojn, kiuj sin paŝtas sur la vasta stepo, kaj nur en vintro koncentriĝos.

Matene, ni eniris la stepon. La herboj pli kaj pli maldensiĝis, kaj ni devis transiri sablaĵojn de tempo al tempo. Nur tagmeze ni trovis oazon. Tie staras vicoj da bonordaj domoj, kie estas oficejo de la brutobreda brigado. Ĉe maŝinputo apud ili kameloj interpremiĝe trinkis akvon.

Namujilemuce diris: “Vi renkontas bonan ŝancon. Baldaŭ vigliĝos ĉi tie!”

Juna Zhang, vicestro de la brigado, regalis nin per dolĉaj melonoj kreskigitaj en la dezerto. La brigado nomiĝas Zhahabuluge, kiu signifas “ĉe fonto”. Antaŭ kvar jaroj ili konstruis maŝin-

puton kaj transformis la lokon en malgrandan oazon. Nun ili bredas dumil kamelojn.

Vere, baldaŭ gregoj da kameloj venis tien. Nur tiam ni ekkomprenis, kial Namujilemuce kondukis nin al la loko. Tiuj nealvokitaj kameloj kolektiĝantaj ĉirkaŭ la akvo havigis al ni bonan ŝancon por fotado.

Kiam la kameloj finis sian trinkadon kaj kuŝiĝis por ripozo, Namujilemuce kondukis nin al la grasaj kaj fortikaj kameloj. Li metis bridojn al la nazoj de du kameloj kaj invitis nin rajdi sur ilin. Samtempe li rakontis pri la vivkutimoj de kameloj.

En somero kameloj ĉiam iras kaj kuŝas kontraŭ vento por iom mildigi la varmon, sed agas male en vintro kaj printempo, precipe en pluvaj aŭ ventegaj tagoj. Ili emas disiĝi dum manĝoprenado kaj ariĝi dum ripozado. Ĝenerale, ili iras al paŝtado kaj revenas en kolono laŭ fiksa linio kaj ne prenas manĝon survoje.

Longa eltenado de soifo kaj malsato estas la plej granda karakterizaĵo de kamelo. Ĝi povas trinki 50 ĝis 70 kilogramojn da akvo unufoje. Eĉ senakva vivo de 8-9 tagoj ne influas ĝian fiziologian aktivadon. Ĝi povas manĝi ĉiufoje grandan kvanton da herboj kiam tio abundas. La du ĝiboj de kamelo similas al du tenejoj de graso en kvanto de 35 kilogramoj ĉe iuj kameloj. Dank' al tio, kamelo povas teni normalan vivon dum sep ĝis dek tagoj, sen manĝo.

### DILIGENTAJ PAŜTISTOJ

Kvankam kameloj estas adaptiĝemaj al tia medio, tamen paŝtistoj ankoraŭ devas labori diligente. Precipe en la periodo kiam velkiĝas herboj, ili devas eliri frumatene kaj reveni malfrue, spite venton kaj pluvon, por trovi bonan herbejon. Ili devas konstrui stalojn por la kamelidoj kaj kamelinoj; kaj trinki al kameloj ĉinmedicinan dekoktaĵon antaŭ la somermezo por preventi somerajn malsanojn. Des pli peniga estas la kolektado de kamela lano. Februare, ili devas tondi lanon de kameloj sub la kolo kaj la kubutoj. Kaj dum paŝtado en varmega somero, ili devas kolekti defalintan lanon de kameloj.

Dum la vizitado ni trovis, ke multaj komunumoj kaj brigadoj disvolvas stepan konstruadon. Ili konstruis pumpil-putojn kaj akvo-rezervejojn,



*Dejoraj kameloj*

kaj kultivis bruto-nutrajn plantojn kaj furaĝajn herbojn en tereno ĉirkaŭata per ligno-palisoj kaj ter-muroj.



Nun en la tuta gubernio oni konstruis furaĝajn bazojn kun areo de pli ol sepdek mil muoj (1 muo=1/15 hektaro), kies jara produktokvanto de herbo superis dek milionojn da kilogramoj, kaj realigis memprovizadon de furaĝo.

Ni vizitis Tuanjie-brigadon situantan ĉe la rando de la dezerto. La brigado konsistas el 55 familioj kaj duono de la loĝantoj estas mongoloj. Krom bovojn kaj ŝafojn, ili bredas ankaŭ pli ol trimil kamelojn. En la kvindekaj jaroj, la brigado posedis nur pli ol mil kamelojn, el kiuj multaj estis malgrandaj kaj malbonaj.

En 1965, ili elektis kamelinojn kun granda korpo, longaj lanoj bel-koloraj, kaj parigis ilin kun plej bonaj vir-kameloj. Nun la kameloj kun malbona lano de la brigado estas fundamente eliminataj. La natura longeco de lano pliiĝis de 2-4 centimetroj ĝis 5-6 centimetroj. Ordinara kamelo ĉiujare donas pli ol 3.5 kilogramojn da lano, dum la selektita, 7 kilogramojn. Tamen la antaŭa produktokvanto estis nur 2-3 kilogramoj. En la pasinta jaro la brigado enspezis sole per lano pli ol 50,000 juanojn.

Kamelo povas doni lanon, viandon, lakton kaj ŝarĝ-servon. En la selekta laboro, la hoŝoo prenas altigon de kvalito kaj kvanto de lano kaj viando kiel la ĉefan taskon. Ni rimarkis, ke la selektitaj kameloj havas grandan kaj fortikan korpon, densan kaj longan lanon, kaj dikajn muskolojn. En la komerca kooperativo de la gubernio ni vidis monton da kamela lano,





*Veterana paŝtisto Namujilemuce, estro de la hoŝoa brutobreda buroo*

kiun ĝi aĉetis de paŝtistoj. Tia lanero estas tre mola, maldika, longa, malgluiĝema, humido-izola, pureco-tenema, kaj tre bona tekstila krud-materialo. La kamela viando estas materialo por sekigita vianda haketaĵo. La nutro-riĉa kamela lakto estas ĉefa trinkaĵo por paŝtistoj. Krome, la kamela felo povas esti preparita en ledon solidan. Peltaĵo el kamelida felo estas malpeza, mola kaj varmo-konserva, solida kaj humido-izola. Ankaŭ la ĝiboj kaj plandoj de kamelo estas famaj bon-gustaĵoj en festeno.

### ŜIPO EN DEZERTO

Dum la vizito, ni ofte vidis, ke grupo kaj grupo da kameloj ŝarĝitaj per varoj marŝas en la dezerto, kun tintado de sonoriloj.


Kamelo lertas en irado kaj povas libere agi en la dezerto. Ĝi servas kiel bruto por ŝarĝo, tirado kaj rajdo, tial ĝi estas populare nomata "Ŝipo en Dezerto". Kamelo posedas neordinarajn korpo-organojn. Ĝi povas laŭvole fermi siajn naz-truojn por rezisti kontraŭ sablo-vento. Ĝiaj longaj okulharoj povas ŝirmi la okulojn de sablo-vento. La huf-plandoj de kamelo estas tiel grandaj kiel ventumiloj kaj povas subteni la kruojn, ke ili ne ensabliĝu. Ĝia alte etendata kapo similas al belfrido. Per sia akra percepto pri akvo ĝi povas trovi akvofonton en seka dezerto.

La mastro diris al ni, ke la tir-povo de unu kamelo egalas al tiu de unu ordinara tir-ĉevalo aŭ du grandaj virbovoj. Kamelo kun rajdanta homo povas iri 70 kilometrojn en ok horoj. Kiel ŝarĝ-bruto, unu kamelo povas porti 200 kilogra-

mojn da varoj. Kaj kiel jung-bruto, ĝi povas tiri pezon de 1,500 kilogramoj.

Hodiaŭ, kun disvolviĝo de modernaj veturiloj, reduktiĝas la ŝarĝ-servo de kamelo. Tamen ĝi ankoraŭ ludas gravan rolon en la brutobredado en dezerto. Tri komunumoj de la hoŝoo plejparte troviĝas en la dezerto. Elportado de brutaj produktaĵoj, enportado de viv-bezonaĵoj, libroj kaj ĵurnaloj, kaj la aktivado de rondiraj kuracistaĉmentoj kaj artaj trupoj dependas ĉefe de kameloj. En suda parto de Tenger-dezerto estas loko nomata Tonghu, kie abunde produktiĝas glaŭbersalo. Kiam vintro venas, ĉirkaŭaj popol-komunumoj foje kaj refoje sendas al la loko, en dezerto pli ol 30 kilometrojn fora, centojn kaj centojn da kameloj por transporti glaŭbersalon al prilaborejoj.

En la dezerto ankaŭ "dejoraj kameloj" plaĉas al vizitantoj. Kiam perioda long-distanca aŭtobuso atingas la stacion ĉe la rando de Tenger-dezerto, "dejoraj kameloj" jam atendas tie pasaĝerojn, kiuj deziras trapasi la dezerton. Tiaj kamelaj grupoj de popol-komunumo transportas pasaĝerojn trifoje en ĉiu semajno laŭ difinita linio. Post malmulta pago, pasaĝero povas rajdi kamelon kaj komenci interesan vojaĝon. Survoje oni instalas staciojn por manĝo kaj ripozo. Se la vetero estas bela, oni povas ĝui kampadon. Post manĝado oni povas babili plezure ĉirkaŭ tend-fajro sinapogante al kuŝantaj kameloj. Maljunaj kamelistoj povas rakonti al vojaĝantoj interesajn historiojn kaj legendojn pri okazintaĵoj en la dezerto.



## *Belajaĵoj de Chengde*

de PENG WEN

**L**A monturbo Chengde en norda Hebei-provinco estas fame konata turisma urbo.

En tiu urbo troviĝas la plej granda imperiestra ĝardeno de Qing-dinastio la Somera Vilao. En tiu vilao estas la plej granda ligna statuo de bodisatvo en Ĉinio. Krome tie troviĝas ankaŭ multaj aliaj rigardindaj historiaj lokoj kaj pitoreskejoj.

Chengde troviĝas nur 250 kilometrojn for de Beijing (Pekino), kaj estas facile atingebla per trajnoj ĉiutage veturantaj inter ili.

La plej fama Somera Vilao de Chengde situas en la norda parto de tiu urbo. La konstruado de ĝi komenciĝis en 1703. En tiu tempo, Imperiestro Kangxi de Qing-dinastio ĉiujare veturis de Beijing Norden por inspektado, kun la celo gardi la unuigon de la multnacieca ŝtato, firme teni la teritorion kaj rezisti kontraŭ agresado de cara Rusio, tial palacoj kaj stacioj estis instalitaj laŭlonge de la vojo. Ĉar Chengde estis nepre trapasata loko

je konvena distanco kun bela pejzaĝo kaj aliaj dezirindaj naturaj kondiĉoj, ĝi estis elektita de Kangxi por konstrui grandiozan palacon por uzo dum vojaĝo. En 1712, Kangxi persone skribis por ĝi titolon "Somera Vilao" sur tabulo, sed la konstruado de tiu vilao estis finita nur en 1790. Kangxi, Qianlong kaj aliaj imperiestroj de Qing-dinastio somerumis ĉiujare en tiu loko, kaj dume ankaŭ plenumis ŝtatajn aferojn kaj akceptis tie nacimalplimultajn princojn kaj fremdlandajn senditojn. Tial la Somera Vilao fariĝis la dua politika centro en la frua periodo de Qing-dinastio, kaj ĝi estis kutime nomata la Provizora Palaco en Chengde.

Tiu vilao okupas 560 hektarojn, t.e. pli ol duono de la areo de Chengde kaj duoble tiom kiom okupas la Somera Palaco de Beijing. La tereno interne de la ĉirkaŭmuro de la palaco kun longeco de dekkelkaj kilometroj estas dividita en du partojn, nome tiu de konstruaĵoj kaj tiu de ĝardeno. La lasta inkluzivas lagon, ebenaĵon kaj montojn. Utiligante la naturajn aspektojn de

montoj, valoj, ebenaĵo kaj lago, oni tiel lerte aranĝis la vilaon, ke tre variaj estas ĝiaj vidaĵoj, kiuj impresas kaj per imponaj belajaĵoj de norda Ĉinio kaj per ĉarmaĵoj de suda Ĉinio, tiel ke la vilao prezentigas kiel miniaturo de nia aminda patrolando. Post la Liberiĝo, la popola registaro enlistigis la vilaon kiel unu el la ĉefaj protektindaj kulturaj objektoj de la tuta lando kaj plurfoje ĝin riparigis, dank' al kio la kaduka antikva palaco iom post iom restariĝis.

Enirinte la sudan pordegon de la palaco Lizhengmen, oni vidas ĝiajn konstruaĵojn. La palacaj domegoj kun artisme aranĝitaj koridoroj aspektas majestaj inter antikvaj arbejoj. La ĉefa halo kun vasta spaco staras en la tria korto. La tuta halo estas konstruita el valora nanmu-ligno produktita en suda Ĉinio kaj odoras je diskreta aromo. Dum imperiestroj de Qing-dinastio somerumis kaj ĉasadis en Chengde, ĉiuj solenoj estis okazigitaj en tiu halo. Post tiu halo estas la imperiestra dorma apartamento, en kiu montriĝas fajnaj objektoj kaj



ornamaĵoj uzitaj de imperiestroj kaj metitaj en iliaj antaŭaj lokoj.

La haloj de tiu palaco ne estas tiel brilkoloraj kiel tiuj de Beijing. Iliaj brikoj kaj tegoloj estas bluaj, la kolonoj estas brune kolorigitaj, kaj ilia gusto de simpleco kaj senpompeco tre harmonias kun la natura pejzaĝo.

Post la konstruaĵoj estas tereno de ĝardeno, kies lazura lago saltas la unua en la okulojn de la vizitantoj. La tuta lago kun areo de 80 hektaroj ne estas tiel libera kiel Kunming-lago de la Somera Palaco de Beijing. Multaj insuletoj kaj digoj dividas la lagon en interligitajn pitoreskejojn similajn al belaj parketoj en suda Ĉinio.

Ĉe la lago estas multaj belajoj kaj la pavilono Yanyulou sur insulo estas unu el ili. Antaŭe ĝi estis uzata de imperiestroj por legado kaj aprecado de pluvo. Antaŭ tiu duetaĝa konstruaĵo estas koridoro, post ĝi estas artefarita monteto kaj kiosko, kaj en la lago ĉirkaŭ ĝi kreskas lotusoj. Oni diras, ke foje Imperiestro Qianlong inspektis Zhejiang (Ĝegiang) kaj vidis ĉe la lago Nanhu de urbo Jiaxing pavilonon en pluveto, kiu tre plaĉis al li, sekve li ordonis konstrui Yanyulou imite al ĝi. Sudoriente de tiu pavilono estas Jinshan-kiosko, kiu estas imitaĵo de la bela templo Jinshansi de Jiangsu (Giangsu)-provinco. Ne fore de ĝi en la nordo estas la Varm-rivera Fonto. Ĝi estas unu el la fontoj en la vilao kaj ĝi ricevis sian nomon pro tio ke ĝia akvo ĉiam tenas temperaturon de ĉ. 18° C. Ĝi estas unu el la fontoj de Rehe-rivero (t.e. Varma Rivero). Tiu rivero longas nur 700 metrojn kaj estas netrovebla en ordinaraj mapoj.

Norde de la lago estas vasta ebenaĵo. Antaŭe tie vivis aro da cervoj sur verda herbejo punktita

de mongolaj jurtoj, simile al paŝtejo. En tiu loko, imperiestroj de Qing-dinastio ofte piknikis, akceptis princojn, ministrojn kaj eksterlandajn senditojn aŭ rigardis luktadon, surĉavalan arkpafadon k. s. sportojn ŝatatajn de la paŝtistoj.

Okcidente kaj norde de la vilao abrupte leviĝis montoj, kiuj okupas kvar kvinonojn de la tereno de la vilao. Tie troviĝas kaj montoj kovrataj de arbaroj kaj profundaj kvietaj valoj. En printempo, ĉie ĉarmas floroj kaj en aŭtuno ĉie abundas fruktoj sur la montoj. En la Kiosko en Nuboj kaj Montoj sur montpinto, oni povas vidi, ke la ĉirkaŭmuro de la vilao serpentas simile al la Granda Muro kaj oriente kaj norde ekster la vilao staras en vico grandaj temploj sur montodeklivo — ili estas la famaj Eksteraj Ok Temploj.

Tiuj temploj estas konstruitaj en la periodo de 1713 ĝis 1780. Antaŭe estis 11 temploj, el kiuj tri detruigis, kaj la ceteraj ricevis la nomon la Eksteraj Ok Temploj. Kaj el tiuj ok nun restas nur sep. La konstruado de tiuj temploj registris en diversaj facetoj la historian procedon de la firmiĝo kaj disvolviĝo de nia unueca ŝtato de multaj naciecoj.


La plej grandioza kaj pompa el tiuj temploj estas Puning-templo. Ĝi estis konstruita memore al la venko super ribelo celanta spliti la patrolandon. La antaŭa halo prezentas la antikvan arkitekturan tradicion de han-nacieco kaj la posta halo staranta ĉe monttalio prezentas tibetan plastikan arton, kaj la konstruaĵoj de la tuta templo harmonie kunarangitaj simbolas la solidarecon kaj kulturen interfluan de ĉiuj naciecoj de nia lando.


La halo kun alteco de 36 metroj ĉe monttalio estas la ĉefa konstruaĵo de Puning-templo. En tiu



*Jinshan-kiosko*

*Varm-rivera Fonto*





Yongyousi-pagodo

halo troviĝas la giganta ligna budha statuo kun alteco de 22.28 metroj kaj cirkonferenco de 15 metroj ĉe la talio. Ĝi estas farita el 100 kubmetroj da ligno kaj pezas 110 tunojn. La giganta budho havas 42 manojn tenantajn glavon, lancon, sunon, lunon kaj aliajn armilojn en konvena aranĝo. Tiu statuo estas belaspekta, simetria kaj en vestaĵoj kun naturaj sulkoj. Ĝi montras la eminentan arton de niaj antikvaj gravuristoj kaj estas valora heredaĵo en nia arta trezorejo. En la komenco de la sesdekaj jaroj la institucio de kulturaj objektoj venigis spertajn metiistojn por riparado, kaj post 3.5 jaroj da diligenta laborado de ili, la giganta budho kaj la halo estis rebonigitaj.

Inter la Eksteraj Ok Temploj sin trovas ankaŭ du tipe tibetaj temploj. Unu el ili nomiĝas la Templo de Feliĉo kaj Longviveco, kiu estis konstruita laŭ speciala ordono de

Imperiestro Qianlong, imite al Chashilhumpo-templo loĝata de Banchen, por akcepti Banchen la VI-an, la politikan kaj religian ĉefon de malantaŭa Tibeto. La alia estas Putuo-templo kun areo de 22 hektaroj, konstruita imite al Potalalaco en Lhasa. Tiuj temploj ornamitaj per verdaj arboj, belaj artefaritaj montetoj, artisme konstruitaj monumentoj, ĉarmaj pagodoj kaj majestaj domoj formas pentrin-dajn pejzaĝojn. La ĉefaj haloj de tiuj du temploj kun tegmentoj el orumitaj tegoloj blindige brilas en sunlumo. Kaj sur la kvar tegmentaj anguloj de la ĉefa halo de la Templo de Feliĉo kaj Longviveco instaligis 8 oraj drakoj tiel vivecaj, ke ili kvazaŭ estus flugantaj en nubaro. Tiuj grandiozaj konstruaĵoj unuflanke montras al ni la saĝecon de la laboranta popolo de nia lando, aliflanke atestas pri la ekspluatado de la feŭdaj regantoj al la popolo. Sole por fari la orumitajn tegolojn de la du temploj oni jam uzis ĉ. 30,000 uncojn da oro.

La urbo Chengde ne nur havas belan palacon kaj multajn historiajn lokojn, sed ankaŭ nemalmultajn montpintojn kaj rokegojn en kuriozaj formoj sur la ĉirkaŭaj montoj, kiuj pliiĝis la naturan ĉarmon de la urbo. Tiuj montpintoj kaj rokegoj ricevis interesajn nomojn laŭ siaj formoj, ekzemple la Arahata Monto similas al kaŭranta bonzo kaj la Rano-roko similas al rano kun levita kapo. Sed plej okulfrapa estas la Monto Klabo oriente de la urbo. Sur la monto klabo-forma rokego kun alteco de pli ol 50 metroj, kies supra parto estas pli dika, rekte pikas la ĉielon forte impresante per sia alteco kaj mirinda aspekto. Tiu vidaĵo estas grava konsistiga parto de la naturaj belajoj de la Somera Vilao kaj la Eksteraj Ok Temploj. Por apreci tiun montpinton, Imperiestro Kangxi speciale

konstruigis kioskon sur Xiqi-monto en la vilao. En vespero, la Monto Klabo en lumo de la subiranta suno estas aparte ĉarma.

Ne fore de Chengde troviĝas du aliaj montoj starantaj unu apud la alia similaj al gigantaj kolonoj, kiuj estas nomataj Pagodo-paro. Rigardate de malproksime, ili tre similas al du altegaj pagodoj. Kaj interesaj legendoj estas kreitaj pri tiaj mirindaj rokegoj. Ekzemple, oni diras, ke sur la Kokkresta Monto estas paro da starantaj kokoj. Legendo diras, ke en la tago, kiam la Ruĝa Ekрана Muro antaŭ Lizhengmenpordego de la Somera Vilao estis finkonstruita, subite paro da oraj kokoj flugis de la Kokkresta Monto en la muron. Ĉar urĝis tempo por fini la konstruadon, la masonistoj ne kuraĝis perdi eĉ sekundon kaj devis masoni la kokojn en la muron. Tial, kiam hodiaŭ oni ekfrapas la Ruĝan Ekranan Muron, tuj aŭdiĝas mallaŭta kokokrio. Interesite de la bela legendo, multaj turistoj iras frapi la Ruĝan Ekranan Muron por aŭdi kokokrion. Efektive la kluko estas nur mirinda eĥo estigita pro lerta aranĝo de la masonistoj pri la konstruaĵoj, kio spegulas la altegan konstruan teknikon de la antikva laboranta popolo de nia lando.

Centojn da jaroj la oraj kokoj kokerikis en la malnova socio, tamen la lando ĉiam restis en mallumo. Tiam la popolamasoj vivis tragike. Baraktante en mizeroj, kompreneble ili eĉ ne povis revii pri somerumado kaj aprecado de belaj pejzaĝoj. Kaj krome, la provizora palaco estis severe gardata kaj absolute neenirebla por ili. Hodiaŭ tute aliĝis la stato. Ĝi estas mas-trata de la popolo kaj malfermita ne nur al la vastaj amasoj de Chengde, sed ankaŭ al turistoj de aliaj lokoj, inkluzive de geamikoj el ĉiuj partoj de la tuta mondo.







La kiosko Nanshan Jixue

Yanyulou-pavilono










Puning-templo konstruita en 1755




Pule-templo konstruita en 1766 imite al la Preĝejo de Riĉa Rikolto de la Ĉiela Altaro de Beijing



Parto de Puning-templo



Panorama de Putuo-templo konstruita de 1767 ĝis 1771 imi-  
te al Potala-palaco en Lhasa, centro de la ĉina lamaismo






La ligna budha statuo kun mil manoj kaj mil okuloj en Puning-templo




“Somera Vilao” skribita de Imperiestro Kangxi




Plafono de Pule-templo kun orŭmitaj lignaj gravuraĵoj



Pli ol 13,000 kupraj budhaj statuoj sur la ĉefa konstruaĵo de Puning-templo




Ora drako sur la ĝamento de la Templo de Feliĉo kaj Longviveco





La hao Yanbo Zhi Shuang, konstruita en 1710 kaj servanta kiel dormoĉambro de imperiestroj



Interne de Nanmu-halo konstruita en 1754





*La hejmloko de Tria Franjo Liu*

YA RU KAJ LAO BAI:

## EN LA HEJMLOKO DE TRIA FRANJO LIU

ĈIUJ, kiuj vizitas ĝuang-ajn vilaĝojn en Guangxi (Guanghi), deziras havi ŝanĉon aŭskulti tieajn popolkantojn. Iliaj belaj melodioj, vivecaj metaforoj kaj plaĉaj voĉoj estas vere ĉarmaj. Se vi demandus, kiu instruis al la amasoj tiel bele kanti, oni dirus al vi, ke unue tion instruis persone Tria Franjo Liu.

Tria Franjo Liu estas heroino en legendo vaste cirkulanta en la regiono loĝata de ĝuang-oj. Oni diras, ke ŝi estis laborema, kuraĝa, saĝa kaj bela knabino de ĝuang-nacieco, vivanta en Tang-dinastio (618 — 907 p.K.). Per akraj popolkantoj ŝi forte kritikis sociajn maljustaĵojn kaj kon-

traŭstaris la subpremadojn de la feŭda bienularo por venĝi la maljuste traktatan laborantan popolon. Post la Liberiĝo, multaj profesiaj kaj amatoraj teatraj trupoj adaptis la legendon pri Tria Franjo Liu al scenejo kaj pli ol 60 teatraj trupoj ludis diversajn operojn de la sama titolo "Tria Franjo Liu". Surbaze de tiuj operoj, scenaristo adaptis ĝin al la ekrano kaj tiu filmo rikoltis multajn laŭdojn en kaj ekster nia lando.

Kie estas la hejmloko de la "Feino-kantistino" Tria Franjo Liu? Cirkulas diversaj asertoj. Same kiel 7 grekaj antikvaj urboj, kiuj konkure pretendis esti la hejmloko de la blinda epepeisto

Homero, la loĝantoj de multaj lokoj pretendas, ke Tria Franjo Liu estas ilia samlokano. Laŭ historia literaturo, ŝi naskiĝis en Luocheng-gubernio en la norda parto de Guangxi kaj pro persekutado de bienuloj, ŝi translokiĝis al Xiajian-vilaĝo apud la rivero Xiajian en la najbara Yishan-gubernio.

En la pasinta jaro, ni venis de Beijing al la gubernio Yishan. La gubernia urbo jam havas historion de pli ol dumil jaroj. Ambaŭborde de rivero fluanta tra la gubernio kuŝas pli ol dudek mil hektaroj da fekundaj kampoj kaj ĉie verdas pinoj, abioj kaj bambuoj. Apenaŭ enirinte tiun gubernion kun belaj pejzaĝoj en ĉiuj sezonoj, ni aŭdis agrablan popolkanton de malproksime:

*Ekridas floroj en printempa vento,  
kantistoj ĝuang-aj venas por prezentoj;  
ĉar Franj' Tria pioniris en kantado,  
ĉe l' ĝuang-oj ĉie viglas kanttorento.*

Kantado de popolkantoj fariĝis kutimo de la ĝuang-a popolo. Antaŭ pli ol tricent jaroj, la laboranta popolo de tiu regiono kreis, surbaze de popolkantoj kaj sub la influo de hŭagu-opero de Hunan-provinco, specon de popola opero nomatan *cajdiaŭ*. Per viveca formo de kantoj kaj dancoj, *cajdiaŭ*-opero spegulas fragmentojn de la vivo de la laboranta popolo. Ĝi estas sprita, simpla, facile komprenebla kaj karakterizata per fortaj nacia koloro kaj intensa vivetoso. Antaŭ pli ol 20 jaroj, la unua *cajdiaŭ*-opero "Tria Franjo Liu" naskiĝis en Yishan.

Nun en tiu gubernio *cajdiaŭ*-opero estas tre populara. Kiel la infanoj kaj junuloj, tiel ankaŭ

*El la opero "Asan Ŝercas pri Sinjoro"*



la blankharaj maljunuloj tre ŝatas kanti ariojn de tiu loka opero. Kiam ni alvenis al la gubernia urbo, en la Kultura Domo de tiu gubernio funkciis mallonga kurso por amatoraj *cajdiaŭ*-aktoroj kaj *cajdiaŭ*-laborantoj. Inter la pli ol 400 kursanoj, sin trovis laboristoj, kamparanoj kaj oficistoj. Tage ili diskutis kaj studis prezentan arton de tiu speco de opero, kaj nokte ili prezentis siajn *cajdiaŭ*-operojn por lerni unu de alia. Inter la luditaj operoj, troviĝis la tradiciaj "Wang San Ĉasas Birdojn", "Asan Ŝercas pri Sinjoro" kaj "Filino de Drako kaj Han Peng" kaj nove verkitaj operoj kiel "Tria Franjo Liu Revenas al Longjiang-rivero". "Filino de Drako kaj Han Peng" temas pri junulo Han Peng en antikveco. Han Peng estas laborema kaj honesta junulo, kiu perdis sian patron en infaneco kaj vivtenadas sian patrinon per kolektado de brullignoj kaj fiŝado. Lia konduto kortuŝis la filinon de Drako, la dio de akvoj. Spite al malpermeso de la leĝo de la akva regno, la knabino ŝanĝiĝis en oran konkon, naĝis supren por ke Han Peng levu kaj portu ĝin hejmen. En la domo de Han Peng, la knabino reprenas sian formon kaj ĉiutage plenumas dommastrumajn laborojn por la junulo, kiam tiu ĉi forestas. Han Peng tre miras kaj sentas koran dankon pro la miraklo. Por esprimi sian dankon, li klopodas renkonti la bonfaranton. Iutage, li revenas de sia laboro kaj surprizas la feinon, kiu ne havas tempon por sin kaŝi de li. Ili interŝanĝis vortojn de amo kaj fariĝis feliĉa paro. Per diversaj gestoj kaj helpe de ventumilo, la aktoroj tre sukcese prezentis siajn rolojn kaj rikoltis multajn aplaŭdojn.

En tiu gubernio vivas 420,000 popolanoj kaj pli ol 3,100 personoj aliĝis al 146 amatoraj *cajdiaŭ*-grupoj de la 150 produktaj brigadoj. En la festaj tagoj kaj ferioj, ili senescepte prezentas siajn memverkitajn programerojn kaj tiel ludis aktivan rolon en la kultura vivo de la amasoj. En la lastaj jaroj, tiuj amatoraj artistaj grupoj liveris pli ol 80 personojn al profesiaj artaj trupoj kaj lernejoj por ilin eduki kaj fari ilin pli talentaj artistoj.

En la hejmloko de Tria Franjo Liu kaj la tuta aŭtonoma ĝuang-a regiono ankaŭ okazas grandaj kunvenoj por kantado. Tiaj kunvenoj nomataj *goŝju* estas tre populara kaj grandinflua kultura



kaj arta aktivado. *Goŝju* okazas ĉiujare en fiksjaj tamen ne samaj datoj en diversaj lokoj. Ĝenerale tia kunveno okazas en printempo kaj somero. Dum tago por *goŝju*, la gejunuloj surmetas belajn vestojn kaj iras al la kunvenejo, kie kolektiĝas milo, eĉ dekmilo da homoj. Ili prikantas la agrikulturon, riĉan rikolton kaj sinceran amon. Profitante tian aktivadon, la gejunuloj elektas por si amaton aŭ amatinon. Iliaj kantoj estas improvizitaj kaj la *goŝju*-oj elkulturis popolajn poetojn. Multaj talentaj popolaj kantistoj kaj poetoj kreskis sur tiu fekunda grundo. Fu Jinhua, aktorino de la Guangxi-a *Cajdiaŭ*-opera Trupo, ekleris kanti popolkantojn, kiam ŝi estis nur 5-jara. En sia 13-jara aĝo, ŝi estis akceptita de la trupo pro sia bela kantado. Antaŭ 20 jaroj, ŝi ludis la unua la rolon de Tria Franjo Liu en Beijing kaj poste plenumis kantadon por la rolo de Tria Franjo Liu en la samtitola filmo.

En bela tago, ni venis al Xiajian-rivero kun granda intereso. Ni veturis en boato kontraŭflue al la piedo de Xiajian-monto kaj vidis krutajn rokmurojn kovritajn de verdajoj. Legendo diras, ke tiun lokon frekventadis Tria Franjo Liu por kolekti brullignojn. Ĉe la rokmuro troviĝas bastonsimila ŝtonego, kiu estis, laŭ legendo, uzata de Tria Franjo Liu kiel portveкто. Kiam nia boato veturis en la ravinon, ni kvazaŭ aŭdis kanton de Tria Franjo Liu:

*Jen Xiajian torentas el ravino,  
miljare orienten en rutino.  
La akvo ĝia estas niaj larmoj.  
Ja kiam la sufero venos al la fino!*

Sed sur la bordoj prezentigis nun tute aliaj vidaĵoj. Xiajian-rivero estas ŝlosita de barajo kun longeco de pli ol cent metroj. Ĉe la finoj de la barajo troviĝas 8 pumpmaŝinoj, kiuj levadas akvon por irigacii la kampojn sur la bordoj. Ĉe la loko, kie Tria Franjo Liu lavadis vestojn kaj transveturis la riveron, nun staras arkoponto kun longeco de 120 metroj. Sub tiu grandioza ponto de nacia stilo aŭdiĝis de tempo al tempo kantoj kaj ridoj de knabinoj lavantaj vestojn:

*Jen el la kluz' Xiajian-torento  
tra montoj en kamparon kuras;  
ĝi tiel fluos tra jarcentoj,  
senfine ĝojon ĝi kulturigas.*






*Tria Franjo Liu rolita de Fu Jinhua*

*El la opero "Wang San Ĉasas Birdojn"*



KE XIN:



*La elterigitaj bronzaĵaj kruĉoj kun antikva alkoholaĵo*

## Alkoholajo de pli ol 2200 jaroj

**R**ARA antikva vino de pli ol 2200 jaroj lasttempe eksponiĝis en la "Ekspozicio de la Antikvaĵoj el Reĝa Maŭzoleo de Zhongshan-regno" aranĝita de la Beijing-a Muzeo de Imperiestra Palaco. La vino estis trovita en tombo de la periodo de Militantaj Regnoj (475-221 a.K.), situanta en Pingshan-gubernio de Hebei-provinco.

En la ekspozicio estis elmontritaj du specoj de antikva vino, unu el ili estas smeralda, klara kaj diafana likvaĵo, kiu kun pezo de pli ol dek ĝinoj (unu ĝino = 0.5 kg.) estis entenata en bronza kruĉo en la tombo, kaj okupas 7-8 dekonojn de volumeno de la kruĉo. En la vino oni trovis 5-centimetran mason. La alia speco nigreverda, kaj peza je kelke da ĝinoj duone plenigis alian bronzan kruĉon.

Tiuj du kruĉoj da antikva vino estis konservataj en tombo de la reĝo Xi de Zhongshan-regno. En 1977, kiam arkeologoj prifosis la tombon, ili trovis en ĝiaj orienta kaj okcidenta keloj pli ol 10 bele faritajn bronzaĵajn kruĉojn, inter kiuj du estis tre pezaj. Skuante ilin oni trovis, ke ili entenas lik-

vajn. Ili malfermis la rustiĝintajn kovrilojn de la kruĉoj, tuj alkohola aromo tiklis ĉies nazojn. Ili mire ekkriis: "Alkoholajo!?" Post kemia analizo specialistoj opinias, ke ili estas alkoholajo nedistilita. Tia alkoholajo similas al rizbrando. Unuapaŝa kemia analizo montris, ke la alkoholajo entenas malmulte da etanolo, tion kaŭzis multa vaporiĝo de etanolo pro longa konservado kaj plurfoja malfermo de la kovriloj post la elteriĝo. El kia materialo oni faris la vinon? Ĉu el greno aŭ lakto? Ĉu la maso en la vino estas el animalaj aŭ plantaj fibroj? Por kio oni metis ĝin en la vinon? Por respondi tiujn demandojn oni bezonas pluan kemian analizon. Iuj konjektis ke ĝi eble estas droga vino farita de tiamaj homoj.

Antaŭ tre longa tempo la ĉina historio jam parolis pri alkoholajo. Almenaŭ en la dinastio Xia ĉirkaŭ 2000 a.K., oni jam komencis fari tion. En la dinastio Zhou (de la dekunua jarcento ĝis 771 a. K.) jam furoris drinkado. En la plej frua poemaro de Ĉinio "Ŝiĝing" troviĝas strofo "aroma vino donos longan vivon". La elterigo de diversaj

vazoj por alkoholajo pravas, ke en la antikveco de Ĉinio oni jam povis fari alkoholajon.

Kial la vino antaŭ pli ol 2200 jaroj povis esti konservata ĝis nun? Specialistoj opinias, ke en tio estas tri kialoj: Unue, la du kruĉoj estis strikte kovrataj per kovriloj, krome bronzo rustiĝas facile kaj la kruĉoj baldaŭ hermetiĝis de la rustaĵo ne longe post la enteriĝo. Due, la tombo situas apud monteto, kaj ĝia hakita ŝtonkavo estis kovrita per ramita tero, tial la tombo-ĉambroj izoligis de aero kaj akvo, kaj tio malebligis al la entombiĝitaĵo seriozan oksidan difektiĝon. Trie, sukerajo vaporiĝas tre malrapide, tial la rizbrando entenanta multe da sukero estis longe konservebla.

La vortoj gravuritaj sur la elteriĝitaj bronzaĵoj montris, ke la entombiĝito estis la reĝo Xi de Zhongshan-regno, kiu estis la tria reĝo de Zhongshan-regno, post kiam ĝi translokis sian ĉefurbon al Lingshou, kaj mortis verŝajne en 306 a.K. Zhongshan-regno estis malgranda ŝtato starigita de la nacimulplimulto Di en la norda parto de Ĉinio, kies loĝantoj vivis nomade kaj ŝatis alkoholajon.



HONG YING:

# JUNAJ LEGANTOJ DE LA BEIJING-A BIBLIOTEKO

**Ĉ**IUMATENE multaj homoj atendas antaŭ la Beijing-a Biblioteko por legado. En la tempo antaŭ malfermo de ĝi iuj parkerigas vortojn de fremda lingvo aŭ la periodan tabelon de kemiaj elementoj. Iuj eĉ kunportas kukojn por pasigi la tutan tagon en la biblioteko.

La Beijing-a Biblioteko okcidente de Beihai-parko estis konstruita en la jaro 1912. Ĝi okupas areon de 50,000 kvadrataj metroj kaj konservas 9,600,000 ekzemplerojn da libroj. (Nia gazeto jam raportis ĝin en sia 10-a numero, 1973) La sidlokoj de ĝiaj legoĉambroj preskaŭ ĉiutage estas plene okupataj. Ĝiaj legantoj estas labo-

ristoj, lernantoj, teknikistoj de fabrikoj, esploraj studentoj de sciencaj institutoj kaj diversaj profesiuloj, kaj plejparto de ili estas gejunuloj.

En la legoĉambroj, iuj studas superan matematikon, aliaj konsultas enciklopedion, triaj memlernas la "Elementan Kurson de Esperanto" kompilitan de la forpasinta kamarado Venlo Fon, kvaraj konsultas librojn pri altenergia fiziko kaj kvinaj faras notojn pri magneta kampo. Unuvorte, la libroj lernataj kaj studataj de ili estas multespecaj, inkluzive de tiuj pri antikva historio, elektroniko, parfumaĵo k.t.p.




*Legoĉambro*



*Libro-pruntejo*

*Legado helpe de grandigilo*



Yang Yinan, teknikisto de la Beijing-a Radioaparata Fabriko, estas junulo reveninta de fremda lando. De multaj jaroj, spite froston kaj varmegon, li pasigis siajn liberajn tempojn en la biblioteko, kopiante el gazetoj desegnojn de diversaj radioriceviloj, televidiloj, aŭtoj kaj aviadiloj por lerni dekoracian belarton. Utiligante la kolektitajn materialojn, li kune kun siaj kolegoj sukcese projektis tute novan belan radioricevilon.

La bibliotekon ofte vizitas ankaŭ Yan Yong, kiu gajnis la duan premion en la matematika

konkurso de ok provincoj kaj du municipoj de la tuta lando. Li estis lernanto de la 42-a Mezlernejo de Beijing. Li estis elstara en sia lernado ekde elementa lernejo ĝis supera mezlernejo. Kiam li saltis de la tria klaso de elementa mezlernejo al la dua klaso de supera mezlernejo, li gajnis 99.5 poentojn meznombro por ĉiu lernita objekto. Foje, instruisto donis al li problemon de planimetrio, li cerbumis kaj cerbumadis, sed ne povis ĝin solvi kaj ne trovis solv-metodon eĉ en la lernolibro. Do, li prunteprenis de la biblioteko "Gvidlibron de Planimetrio", ĝin tralegis en kelkaj vesperoj kaj transskribis ĉiujn teoremojn kaj problemojn. Poste li faris pli ol cent ekzercojn. Dank' al tio li solvis la problemon.

Post tio, preskaŭ ĉiudimanĉe Yan Yong vizitis la bibliotekon por memlerni matematikon kaj fremdan lingvon. Li lernas diligente de la mateno ĝis la vespero, ofte forgesante ripozon kaj forlasas la bibliotekon nur post sonorado por fermo. Lia patro estas inĝeniero kaj lia patrino teknikistino. Ili rigore edukas sian filon kaj kulturis lian bonan kvaliton de seriozeco, modesteco kaj diligenteco ekde infaneco. Dum du jaroj li tralegis ĉiujn koncernajn librojn de matematiko kaj fiziko por supera mezlernejo konservitajn en la legoĉambroj kaj solvis pli ol 900 ekzercojn. La libro "La Demonstra Metodo de Geometrio" redaktita ĉefe de profesoro Yan Jici en klasika ĉina lingvo estas malfacile komprenebla por nemalmultaj legantoj. Yan Yong obstine ĝin legis vorton post vorto kaj frazon post frazo kaj studis ĉiujn ekzemplojn kaj ekzercojn. Por solvi unu malfacilan problemon li uzis eĉ unu tutan monaton. La sukceson atingitan en la matematika konkurso li ja ŝuldas al sia pena laboro!

En la jaro 1978 Yan Yong fariĝis studento de la matematika fakultato de la Beijing-a Universitato. Ĉar lia fremdlingva nivelo jam atingis la normon difinitan por altlerneja diplomito, la universitato promesis, ke li ne lernu fremdan lingvon, por ke li havu pli multe da tempo por studi matematikon. Nun li vizitas la bibliotekon por konsulti diversajn librojn, same kiel antaŭe en ferio aŭ festotago.

25-jara laboristo Wang Peiyuan ĉiam pene studas teknikon kaj faras teknikan renovigon.



Kiel abituriento, li renkontis multajn malfacilojn en teknika renovigado pro manko de scioj pri elektroniko, matematiko, mekanika projekto, desegno ktp. Sed li ne retiriĝis antaŭ malfaciloj. Li diligente memlernis fremdan lingvon kaj konsultis grandan kvanton da fremdlingvaj libroj kaj gazetoj de la biblioteko. Post plurfojaj malsukcesoj li finfine faris tri relative gravajn teknikajn renovigojn kaj plenumis projekton de maŝino urĝe bezonata en produktado. Li ofte diras, ke realigo de la kvar modernigoj dependas de nia penado. Neniu progresinta tekniko en la mondo falus de la ĉielo.

Tre multaj estas tiaj junuloj, kiaj Yang Yinan, Yan Yong kaj Wang Peiyuan, diligente lernantaj en la biblioteko. Kvankam malsamaj estas iliaj familiaj medioj, personaj ŝatoj kaj laboraj kondiĉoj, tamen ili havas komunajn karakterizaĵojn: diligenteco, modesteco kaj persistemo. Ĝuste kiel iuj junuloj diris: En la 50-aj jaroj niaj gepatroj klopodis sin liberigi de analfabeteco, kaj en la 80-aj jaroj ni devas klopodi por studi sciencojn, alie ni ne povos konformiĝi al la disvolviĝo de la epoko.

*Kopiado de materialoj por legantoj*



## La Libroj Lastatempe Ricevitaj

de Sarlanda Esperanto-Ligo:

**La Harmonio de la Kontraŭdiroj**  
**Eta Sarlanda Dialektologio**, verkita de Ludwig Harig, tr. de R. Hauptenthal.

**Streĉita Kordo** de K. Kalocsay (reprezo)

de Japana Esperanto-Instituto:

**エスペラント学力検定試験問題集**, **エスペラント翻訳のコツ**, ambaŭ libroj verkitaj en la japana lingvo estas utilaj por eduki bonajn esperantistojn en la lando.

de Rikardo Ŝulco, la tradukinto:

**La Perdita Honoro de Iu Katarino Blum'**.

de Instituto de Difusao Eŝpirita:  
**Esperanto Kiel Revelacio**.

de Kurisu kei:

**Raporto sub Pendigilo** en la japana traduko, verkita de Julius Fuĉik.

de Ragnar:


**La Knaboj de Paŭlo-strato** (la 2-a eldono).

de Eldona Societo Esperanto:

**Ariaro**, 174-paĝa poezia verko de Harry Martinson, tr. de W. Auld kaj B. Nilsson.

ZHONG XINGWEN:

## *Rapidkalkula metodo de Shi Fengshou*



*Shi Fengshou*

**E**N la vasta halo de la Ĉina Scienca-teknika Universitato iras streĉa konkurso de kalkulo per la kapo kaj per komputilo.

Multaj homoj svarmis tie por rigardi. Unuflanke de la podio staris junulo kun brilaj okuloj kaj aliflanke de ĝi junulino kun komputilo en la mano. Ili absorbite atendis kalkulajn problemojn el rigardantoj.

“ $48,241 \times 35,482 = ?$ ” demandis studento malsupre de la podio. Antaŭ ol la junulino finis sian premadon al klapoj de la komputilo, la junulo jam respondis: “1,711,687,162!”

“ $569,733 \div 832 = ?$ ” demandis alia studento. “684.77,524” tuj respondis la junulo.

Eksplodis foje refoje manklakoj. Kvankam la elmetitaj problemoj estis komplikaj kaj diversaj, la junulo tamen ilin solvis rapide kaj ricevis laŭdadon de la spektatoroj.

Kiu estas li? Kial li povas kalkuli tiel rapide?

Li nomiĝas Shi Fengshou, studento de la Ĉina Scienca-teknika Universitato, ekskluzive akceptita en 1978.

Li povas kalkuli kun mirinda rapideco dank’ al apliko de rapidkalkula metodo kreita de li mem.

Ĉu oni povus fari aritmetikan operacion de maldekstre al dekstre? La problemon Shi Fengshou solvis per sia rapidkalkula metodo. En januaro de 1978, tri institutoj de la Ĉina Akademio de Sciencoj faris plurajn ekzamenojn al tiu metodo kaj unuanime opiniis, ke ĝi estas mirinda, rapida kaj senerara metodo malofta en kaj ekster la lando.

Shi Fengshou naskiĝis en Dali-gubernio de Shannxi-provinco. Kiam li lernis en elementa lernejo, li ricevis bonajn notojn por ĉiuj lernobjektoj kaj precipe interesiĝis pri aritmetiko.

**Ŝtormnokto**

**ĉe**

**Landlimo**

(88Es-148-P)

Tiu ĉi infana bildlibro rakontas pri ĉina mongola knabino Cecen. En iu ŝtorma nokto Cecen trovis, ke la reakcia brutoposedanto Tomor detruas militan telefonan lineon kondukantan al Beijing, kaj batalis kontraŭ la klasa malamiko.

34 koloraj bildoj 18.6 × 17.2 cm.

prezo: £0.22 US\$0.40 DM1.30 FF2.00

Eldoninto: Fremdlingva Eldonejo, Beijing, Ĉinio

Ĝenerala Distribuanto: Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj)  
P.O.Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Mendu ĉe la perantoj, aŭ rekte ĉe la ĝenerala distribuanto!



Kiam li faris multiplikon de du multciferaĵoj nombroj, li pensis: Kial la ciferoj estas skribataj kaj legataj de maldekstre al dekstre sed operaciataj laŭ la kontraŭa direkto en adicio kaj multipliko? Li decidis eltrovi simplan metodon por anstataŭi la tradicion.

En la vivo Shi Fengshou rimarkis, ke la amasoj plejparte alprenas metodon kalkuli de maldekstre al dekstre, kiam ili faras cerban kalkulon kaj ke kiam oni multiplikas ajnan nombron per 5, ili ĉiam povas trovi la produkton per aldono de "0" al la nombro kaj divido de ĝi per 2. Li ankaŭ ricevis inspiron de la kalkula metodo de abako kaj resumis la leĝon de multiplikado per 2 per facile memorebla verso. Post ripetaj operacioj de pli ol unu jaro li trovis la leĝon de multiplikado de ajna nombro per 2 ĝis 9, kaj li povas rapide kaj senerare fari operacion de adicio, subtraho, multipliko kaj divido de nombregoj kun dekoj da ciferoj, en kelkaj sekundoj sen uzo de plumo, papero kaj abako.

En la aĝo de 15 jaroj Shi Fengshou estis sendita de la Eduka Buroo de Dali-gubernio al la dependa mezlernejo de la Nordokcidenta Universitato por lerni. En la lernejo li kreis kalkulan metodon por rapide trovi potencojn kaj faktorojn.

Profesoro Liu Zhihe, dekano de la kemia fakultato de la universitato, rimarkis, ke Shi Fengshou havas rapidan cerbon kaj rigoran logikon kaj studas diligente. Li opiniis, ke li estas bona


"plantido", kaj rekomendis lin al profesoro Zhao Cigeng de la matematika fakultato de la Beijing-a Pedagogia Universitato.

Foje, kiam malgranda Shi faris demonstron en la matematika fakultato de Beijing-universitato, la rektoro de tiu universitato Zhou Peiyuan nokte venis por vidi lin kaj invitis lin al sia hejmo. La rektoro diris: "Knabo, venu, mi volas konkursi kun vi per komputilo." Kaj Shi Fengshou gajnis la tutan konkurson. La rektoro tiel ĝojigis pro trovo de tia bona posteulo, ke li ekaplaŭdis. Kaj Wu Youxiun, vicestro de la Ĉina Akademio de Sciencoj, laŭdis malgrandan Shi ke li havas altan aspiron, kaj telefone petis matematikiston Hua Luogeng ke li faru ekzamenon al tiu studento. Vidinte lian lertan, rapidan kaj seneraran kalkuladon profesoro Hua diris karesante la ŝultron de malgranda Shi: "Tre bone. Vi havas belan perspektivon! Tio estas kuraĝa reformo. Vi povas studi komputeron, en kiun vi apliku vian rapidan metodon por anstataŭi la binaran sistemon, tiel ke la labora efiko de komputero leviĝu dekoble."

Enirinte en la matematikan fakultaton de la Ĉina Scienca-teknika Universitato, Shi Fengshou ricevis milojn da gratulaj leteroj de diversaj lokoj de la tuta lando. Tio tre kuraĝigis lin al verkado de la libro "Rapida Kalkulado". La Ĉina Akademio de Sciencoj asertis, ke enkonduko de lia kalkula metodo estos granda reformo al la matematika instruado de la elementaj lernejoj.



Solvo de "Aranĝado de ciferoj"




# Intervjuo de plongistoj

**A**NTAŬ kelkaj jaroj ankoraŭ ne diskonigis la nomo de la ĉina plongista teamo. Post kiam ĝi gajnis kvar orajn medalojn en la Sepa Azia Sportkonkurso okazinta en Irano en 1974, Liu Henglin, Wu Guocun, Chen Xiaoxia kaj Shi Meiqin gajnis ĉiujn unuajn kaj aliaj ĉinaj sportistoj ĉiujn duajn lokojn de vira kaj virina turplongoj kaj trampiloplongoj\* en la Oka Azia Sportkonkurso okazinta pasintjare en Tajlando, ĝi altiris al si atenton de la publiko. Kial tiu juna teamo povis atingi tiel bonan sukceson en mallonga tempo? Por trovi respondon mi intervjuis plurajn sportistojn de ĝi.

## JUNA SPORTISTINO KUN EMINENTA ARTO

En la Oka Azia Sportkonkurso, 16-jara ĉina plongistino Chen Xiaoxia saltis de sur dekmetra turo kaj preskaŭ vertikale enakviĝis kun rekta korpo, levante nenium akveron, kaj pro tio ŝi ricevis varman aplaŭdadon de la rigardantoj. Iu japana juĝisto de internacia plongado taksis ŝian plongon per dek poentoj. Fine ŝi gajnis la ĉampionecon per 477.42 poentoj, kiuj superis la

*Chen Xiaoxia*



rekordon de 412.71 poentoj kreitan de la sovetunia sportistino monda ĉampiono Irina Kalinina en okcidenta Berlino en la pasinta jaro.

Pri Chen Xiaoxia oni rakontis al mi jenan historion:

En 1974 ŝi estis ankoraŭ elementa lernejanino de kvina klaso de Guangzhou (Kantono). Iun tagon ŝi kuŝis hejme pro malvarmumiĝo. Unu el ŝiaj samlernejanoj alkuris por ŝin informi, ke amatora sporta lernejo varbas lernantojn por plongaj kursoj. Malgranda Chen tuj ellitiĝis kaj iris sin anonci kiel kandidaton. Ĉe la naĝbaseno trejnisto, kiu respondecis pri la varbado, demandis ŝin:

“Ĉu vi scipovas naĝi?”


“Jes.”

“Ĉu vi kuraĝas salti de la bordo en la baseno?”


Apenaŭ finiĝis lia demando, aŭdiĝis “pum” kaj malgranda Chen jam estis en la baseno. Sed ŝi

\* T.e. plongoj de sur saltotabulo.

*Wu Guocun*








*Shi Meiqin*

ekbaraktis en ĝi, ĉar ŝi estis nur komencantino kaj antaŭe ne naĝis en profunda baseno. La trejnisto tre ŝatis ŝian kuraĝecon. Li faris al ŝi aliajn ekzamenojn kaj trovis, ke ŝiaj artikoj estas facilmovaj kaj ŝia korpo svelta. Li akceptis ŝin.

Por ke ŝi partoprenu en plonĝa konkurso, oni sendis ŝin en la ŝtatan plonĝistan trejnan taĉmenton en 1977. Dum tiu tempo ŝi diligente sin ekzercis. Enakviĝo kun horizontale etenditaj manplatoj ĉe rektakorpa saltumo kaj bona regado de subakvaj movoj por ne kaŭzi akvoŝprucon estas nova tekniko aplikata de mondaj konkursoj en la lastaj jaroj kaj nun plenumebraj nur por malmultaj sportistoj en la mondo. Por ellerni tiun teknikon malgranda Chen venkis multajn malfacilojn. En la pasinteco ŝi enakviĝis kun manoj pugnigitaj. Por ŝanĝi tiun movon ŝi milfoje faris ekzercadon pri horizontala etendo de la manplatoj ĉiumatene kaj paŭze de la trejnado. Ĉar dum enakviĝo kun tia pozo la manplatoj devas elteni grandan akvobaron, tio postulas, ke la manartikoj estu fortaj. Ŝi do ĉiutage sin ekzercis per halteroj, puŝado de muro k. a.

Post certa tempo de trejnado ŝi fine posedis tiun movon kaj bone plenumis la plonĝon. La instruisto de la amatora sporta lernejo diris, ke ŝi estas knabino kuraĝa, petolema kaj obstina. Ŝi povas fari 1,000 transkapiĝojn sur saltreto en du horoj. Krome ŝi ŝatas muzikon kaj dancon.



*Liu Henglin*

En la Oka Azia Sportkonkurso ŝiaj mem elektitaj plonĝmovoj de alta malfacileco inkluzivis du-kaj-duoncirklan saltumon malantaŭen (karpe), du-kaj-duoncirklan saltumon returnen (kaŭre), du-kaj-duoncirklan saltumon internen (karpe) kaj unu-kaj-duoncirklan saltumon kun du-kaj-duoncirkla korpoturniĝo. Kaj ĉiuj tiuj movoj estis plenumitaj bele, ĝuste kaj harmonie. Iu el la fremdlandaj ĵurnalistoj diris, ke ŝi estas potenciala monda ĉampiono.

### **KURAGA KREINTO DE NOVAJ MOVOJ**

Vu Guocun plenumis tri-kaj-duoncirklan saltumon antaŭen (karpe) de trampiloplono per belaj kaj rapidaj movoj kaj gajnis oran medalon de tiu sportbranĉo en la Oka Azia Sportkonkurso.

Vu naskiĝis en Zhanjiang de Guangdong-provinco ĉe la bordo de la Suda Ĉina Maro. En sia aĝo de kvin jaroj li jam kune kun plenkreskuloj naĝis en malkvieta maro kaj dek-jara li jam povis unuope transnaĝi dumil metrojn larĝan markolon.

En 1970, hazarde li rigardis prezentadon de plonĝistoj de Guangdong-provinco kaj de tiam en lia juna koro ekĝermis la deziro fariĝi plonĝisto. Post nelonge li vere fariĝis plonĝista kursano de la amatora sporta lernejo de Zhanjiang.

En la unua duon-monata trejnado trejnisto ĉiam lasis lin fari fundamentajn movojn sur la tero kaj pro tio li sentis malpaciencon. Foje li ŝtele ascendis dekmetran plonĝturon sekvante kuranon, kiu iam partoprenis en provinca plonĝista trejna taĉmento, kaj sentime desaltis kun granda plaŭdo. Tion vidinte la trejnisto ne kritikis lin, male tre admiris lin pro lia kuraĝeco kaj decidis kulturi lin en plonĝiston.

Dank' al zorgema kulturado kaj persona diligenteco li jam povis fari hirundan flugsaltumon antaŭen kaj malantaŭen, duoncirklan saltumon internen kaj ankaŭ duoncirklan saltumon malantaŭen kun duona korpoturniĝo en malpli ol du monatoj.


En 1974, 15-jara Vu Guocun jam posedis ĉiujn movojn de trampiloplonĝo por ĉinaj plenkreskaj plonĝistoj kaj komencis ekzerciĝi pri plonĝomovoj de altgrada malfacileco en la mondo, tiam ankoraŭ ne plenumebraj de la ĉinaj sportistoj. En la tutlanda plonĝkonkurso okazinta en la sama jaro li partoprenis kiel membro de la plenkreskula grupo kaj gajnis la duan lokon de turplonĝo kaj la trian lokon de trampiloplonĝo. Post unu jaro, direktate de la trejnisto li kreis novajn malfacilajn plonĝomovojn, inter kiuj tri-kaj-duoncirkla saltumo internen (kaŭre) estis

oficiale enlistigita inter la malfacilajn plonĝomovojn de la mondo post du jaroj. Oni diras, ke homo kun alta arto havas kuraĝecon kaj kuraĝeco ebligas pli altan arton. En la pasinta jaro li kreis malfacile plenumeblan movon de unukaj-duoncirkla saltumo antaŭen kun kvar korpoturniĝoj. Liaj prezentoj estis laŭdataj de la spektatoroj en- kaj ekster-landaj.

### “SURTERA ANASO” GAJNIS ORAN MEDALON

Plonĝisto Liu Henglin naskiĝis en la frosta nordoriento de Ĉinio kaj ŝatis gimnastikon en infanaĝo. Kiam li komencis lerni plonĝon, oni nomis lin “surtera anaso”. Sed en la Oka Azia Sportkonkurso la 19-jara “surtera anaso” gajnis oran medalon de trampiloplonĝo.

Antaŭe oni elektis naĝistojn kaj plonĝistojn nur el suda Ĉinio. Por kulturi nordanajn plonĝistojn, trejnisto de amatora sporta lernejo elektis la 13-jaran Liu Henglin en 1972. Unue li sin ekzercis pri irado kaj saltado sur trampilo kaj enakviĝo sur la tero, poste pri saltado de sur basenobordo en basenon kaj fine saltado de sur dekmetra turo. Ĉar antaŭe li lertis en gimnastiko, li povas bone sin regi dum saltado kaj rapide progresis.



*Trejnistoj kaj sportistoj studas movojn de trampiloplonĝo.*



En 1974, kiel membro de la provinca plonĝista delegacio malgranda Liu partoprenis en la tutlanda plonĝkonkurso kaj gajnis la duan lokon de trampliloplonĝo kaj la trian lokon de turplonĝo por geknaba grupo. En la tutlanda plonĝokonkurso okazinta en la sekvinta jaro li gajnis la ĉampionecon de la geknaba grupo. En tiu jaro li lernis movon de tri-kaj-duoncirkla saltumo malantaŭen, kiu nun ankoraŭ ne estas enlistigita inter la malfacilajn movojn de la monda

plonĝo. Tamen li vundiĝis je la talio kaj genuartiko. Kion fari? Ĉu ĉesigi la ekzercadon pro la vundo? Ne, malgranda Liu ne haltis. Por glorigi la patrolandon, li persistis en la trejnado dum ricevo de la kuracado kaj fine posedis la nomitan movon. En la du tutlandaj naĝaj kaj plonĝaj konkursoj okazintaj en 1976 kaj 1977 li gajnis la ĉampionecon de trampliloplonĝo kaj turplonĝo por la plenkreskula grupo. Oni laŭdis lin, ke la norda "surtera anaso" fariĝis "akva drako".



## KIEL MANĜI

de Ikso

Kamprande du viroj ekvidis:  
proksime ostaroj ŝvebglitis.  
Dum ambaŭ paf-pretis kun arkoj,  
de unu aŭdiĝis rimarko:  
"Ho, kiel plezure ni manĝus,  
se ĝin en pecetojn ni tranĉus!"

"Ba!" ehis tuj krio refuta,  
"prefere rostiĝu ĝi tuta!"  
Dum ardis kverelo, ekscito,  
forflugis la birdoj el vido.

## PROVERBOJ

El akvero post akvero formiĝas rivero. (ĉina)

La vulpoj timas lertan ĉasiston. (jugoslava)

Scio similas al fontakvo sub sablo, ju pli profunde vi fosas, des pli klara ĝi estas. (dana)

Kiu timas surgrimpi altan monton, povas nur vagadi en malalta loko. (araba)

### Solvo de la ludo en la 5-a numero

Prenu pilkon el la kesto kun etiketo "nigra kaj blanka". 1. Se la pilko estas blanka, do ankaŭ la alia en ĝi estas blanka, kaj en la kesto kun etiketo "du nigraj" estas unu nigra kaj unu blanka, dum en la tria kesto estas du nigraj. 2. Se la pilko estas nigra, do ankaŭ la alia estas nigra, kaj en la kesto kun etiketo "du nigraj" estas du blankaj, dum en la tria kesto estas unu nigra kaj unu blanka.

# GIĈETO

*En printempo de la kuranta jaro, la redakcio de la ĉina literatura monata gazeto "Popola Literaturo" aranĝis elektadon de la plej bonaj noveloj de la tuta lando en 1978 kaj 25 noveloj estis premiitaj. La novelo "Giĉeto" estas unu el ili. Nia gazeto aperigos ĝian Esperantan tradukaĵon en tri sinsekvaj numeroj. La aŭtoro estas 28-jara junulo, kiu antaŭe laboris kiel ŝarĝisto de fervoja stacio.*

— LA RED.

## I

En marto de la pasinta jaro, mi veturis per trajno returne al la redakcio post plenumo de intervjuo tasko en alia loko.

En la vagonaro estis tiel multe da pasaĝeroj, ke mi trovis por mi sidlokon nur post multa klo-podo. Sur la kontraŭa benko du mezaĝuloj en kamparanaj vestoj estis interkonsiliĝantaj pri io. Post aŭskultado al ili, mi eksciis, ke ili elvagoniĝos ĉe Xi'an, kaj estis maltrankvilaj pro necer-teco, ĉu ili povos kapti longdistanca aŭtobuson en la sama tago por veturi al Huxian.

"Trankviliĝu, ekveturos aŭtobuso je la 2-a posttagmeze. Vi ĝin kaptos!" Arĝenta voĉo aŭ-digis de la sidloko ĉe la fenestro.

Ni turnis tien niajn rigardojn kaj vidis, ke parolis junulino kun du mallongaj harligoj, ŝajne 24- aŭ 25-jara, nealta, en simplaj vestoj. Sur ŝia vizaĝo kun nuanco de ruĝeto brilas paro da gran-daj okuloj. Ĉar ŝi silente legadis antaŭe, tial neniun ŝin rimarkis.

Aŭdinte ŝian rimarkigon kun tia certeco, iu kadro sur apuda benko demandis: "Ĉu vi scias, ĉu estos longdistanca aŭtobuso al Yaoxian post-tagmeze?"

"Estos," diris la knabino, "kaj ĝi ekveturos je la tria."

"Ĉu estos aŭtobuso, kiu veturos pli frue?"

"Estos. . ." la knabino aldonis post hezito, "tamen eble vi ne kaptos ĝin."

"Je kiu horo?"

"Je la 1-a." Ŝi aldonis post pripenso, "Nu, mi desegnu por vi mapon. La trajno alvenos al Xi'an je 37 minutoj post la 12-a. Elvagoniĝinte vi piediru iom longe por veturi per aŭtobuso de la oka linio rekte al la stacio de longdistanca aŭtobuso. Se vi ne perdos tempon, eble vi kap-tos la aŭtobuson." Tion dirante ŝi prenis pecon da papero kaj ekdesegnigis.

Transpreninte la skizitan mapon, la kadro ĝin eklegis kaj diris emocie: "Dankojn al vi. Kama-radino, ĉu vi ofte veturas per longdistanca aŭtobuso?"

"Ne," la knabino kapskuis kun rideto, "ne-niam."

"Do . . . via hejmo estas en Xi'an? Aŭ vi laboras en Xi'an?"

Ŝi kapneis.

La kadro ekmiris: "Se ne, do vi ofte veturas al Xi'an?"

"Mi ĝin vizitis, sed ne ofte. Malmultfoje."



Ĉiuj estis altiritaj de la interparolo, kaj iu demandis scivoleme: “Kial do vi tiel bone konas Xi’an?”

“...” la knabino ruĝiĝis, kvazaŭ ŝin trafis ĝena demando. Post momenta paŭzo, ŝi ekridetis modeste: “Mi... ja konas.” Tion dirante ŝi mallevis sian kapon por daŭrigi la legadon.

Tiam la sinteno de la knabino vekis scivolon de la pasaĝeroj en la ĉirkaŭaĵo. Ĉiuj esperis, ke ŝi parolos pli multe. Sed ŝi diris nenion plu, kvazaŭ ŝi estus denaske malparolema. Post duona horo, ŝi elvagoniĝis...

Bonŝance, apenaŭ kelkajn tagojn post mia reveno al la ĵurnala redakcio, la fervoja administracio telefonis al ni, ke oni organizis grupon por demonstri diversajn teknikojn, kun la celo disvolvi amasan teknikan ekzercadon, kaj esperas, ke ni raportos pri la inaŭgura demonstro, kiu okazos tiutage.

Kiam mi kaj maljuna Shi haste alvenis al la loko, la demonstrado jam komenciĝis. En la vasta halo, la densa amaso estis en plena silento. Subite eksplodis fulmotondro de manklakoj kun enmiksitaĵoj krioj pro aprobo kaj admiro.

Ankaŭ ni estis tuj absorbitaj. Ĉiuj demonstrantoj estis plej lertaj el la pli ol dek mil laboristoj kaj oficistoj de la fervoja buroo. Inter ili estas nemalmultaj veteranaj fervojistoj kun blankiĝintaj haroj ĉe la tempioj kaj ankaŭ mezaĝuloj tridek-kelk-jaraj. Ja neniuj atendis, ke la lasta kiu aperis sur la podio, estis knabino. Kaj mi tuj rekonis, kun miro, ke ŝi estas neniuj alia ol la knabino renkontita en la vagonaro.

La gvidanto de la grupo anoncis, ke ŝi estas biletvendistino de iu stacio (tiel diference de niaj divenoj!) kaj ŝi demonstros fluan respondon al demandoj pri la distanco de iu ajn granda stacio enlanda kaj la veturkosto por la distanco.

Iu junulo ludis la rolon de pasaĝero. Li rigardis la knabinojn senzorge kaj demandis kun certa nekredemo: “Bonvolu diri, kiom da kilometroj estas de via stacio ĝis Yinchuan kaj kiom kostas bileto por tiu distanco?”

Apenaŭ finiĝis lia demando, la knabino jam respondis senhezite: “1,460 kilometroj, kaj la bileto kostas 25.8 juanojn.”

La junulo ekmiris kaj iom serioziĝis. Li ekprenis skizan mapon pri la fervojoj de la tuta lando kaj demandis sonde: “Kaj kiom ĝis Zhuzhou?”

“1,900 kilometroj, 29.3 juanojn.”

Aŭdiĝis manklakado tra la tuta kunvenejo. Iu maljunulo, kiu laboris multjare kiel biletvendisto, tre interesiĝis kaj paŝis antaŭen: “Se vi povas doni informojn pri la grandaj stacioj, ĉu vi tamen povas informi pri la malgrandaj?”

“Mi ne estas certa pri tio,” la knabino ruĝiĝis kaj diris modeste, “mi provu.”

“Kiom ĝis Xihekou sur la Yingtan-Xiamen-a Linio?”



“1,682 kilometroj, 28.3 juanojn.”

“Kiom ĝis Ranjialin sur la Guizhou-Guangxi-a Linio?”

“1,100 kilometroj, 23.6 juanojn.”

La maljunulo ne plu demandis kaj interesplene demandis kun flanken-klinita kapo: “Kiel vi nomiĝas?”

“Han Yunan.”

“Kiom da jaroj vi laboris?”

“Tri jarojn.”

“Tri jarojn?” La maljunulo larĝigis siajn okulojn pro miro, kaj post kiam la gvidanto de la grupo konfirmis tion, li sin turnis al la ĉeestantoj kaj alte levis siajn manojn ekscitiĝe: “Mirinde! mirinde! Mi laboris kiel biletvendisto dum la tuta vivo, kaj hodiaŭ unufoje renkontis doktorinon biletvendistinon!”

Antaŭ ol la ĉeestantoj povis ekaplaŭdi, la gvidanto de la grupo denove ekdiris laŭte: “Kamaradino malgranda Han ankaŭ povas flue eldiri la startajn kaj atingajn horojn de ĉiuj vagonaroj ĉe la unuaklasaj kaj duaklasaj stacioj. Nun ŝi daŭrigu la demonstradon!”

Aŭdiĝis varma manklakado.

Verdire, la demonstrado ne nur multe mirigis nin laikojn, sed ankaŭ la veteranajn fervojistojn. La demonstraĵo de malgranda Han ja multe superis la limon de ŝia devo. Pripensu, ja kiel multe oni devas klopodi por memori milojn kaj milojn da sekaj ciferoj! Kiel do ŝi atingis tian rezulton? Ĉu ŝi havas eksterordinaran memorkapablon por senpene parkeri kion aliaj ne povas? . . . Kaj krome, kian rilaton la longdistanca aŭtobuso de Xi'an havas kun ŝia laboro?

La scivolo vigligis la animon de mi kaj maljuna Shi. Reveninte al la ĵurnala redakcio, ni petis konsenton de la ĉefredaktoro kaj vizitis ŝin post duona monato.

La sekretario de la partia komitato maljuna Lei varme kondukis nin en la biletvendejon. La vendistoj estis en streĉa laboro. Eble pro nia aparta atento pri malgranda Han, ni baldaŭ rimarkis, ke ŝi vendis biletojn kun aparta rapideco, kaj ankaŭ ŝia labormaniero estis eksteror-

dinara, krom doni ordinarajn respondojn, kelkfoje ŝi subite montris karton al la pasaĝeroj; kaj foje ŝi eĉ diris ion per malfacile komprenebla dialekto . . .

Unu horon poste, ŝi fermis la giĉeton por ripozo. Informiĝinte, ke ni estas raportistoj de ĵurnalo, ŝi subite eksentis ĝeniĝon. Ni klarigis al ŝi ripetfoje, ke ni ne skribos artikolon por la ĵurnalo. Nur tiam ŝiaj vortoj komencis fluadi.

Mi eklaboris en 1974.

Mi estis asignita al la biletvendejo por lerni la metion. Iuj enviis min pro tio, mi tamen ne ŝatis tiun laboron pro la ĝenaj bagatelaĵoj, kaj krome tiel multe da mono trapasis miajn manojn, ke mi tre timis fari erarojn. Tamen mi povis fari nenion kontraŭ tio, mi devis obei la bezonon de la laboro. En la komenco de mia deĵorado, mi vendis biletojn malrapide pro manko de sperto, kaj pasaĝeroj ĉe la giĉeto kriadis pro senpacienĉiĝo. Nia loko estas trafika centro, kaj ĉe ĝi estas multaj pasaĝeroj kaj trajnoj. Oni devas tiel multe paroli tuttage, ke la lipoj preskaŭ sangas de parolado. Pro tio mia sinteno al la pasaĝeroj iom post iom malboniĝis. Kaj de longa praktiko tio fariĝis mia kutimo, kion mi mem ne rimarkis.

En somero de tiu jaro, iu mezaĝa pasaĝero diris, ke li volas aĉeti bileton por veturi per la vagonaro n-ro 54 al Huaxian. Mi diris al li, ke tiu vagonaro ne haltas ĉe Huaxian. “Ĉu?” li diris kvazaŭ li ne bone aŭdis min.

Mi ripetis, kaj li denove diris: “Ĉu?”

Li diris tri aŭ kvar “ĉu”, kio ekflamigis min: “Kial ĉiam ‘ĉu’? Flanken!” Sed kiu atendis, ke li hezitis momenton kaj poste denove enmetis sian monon: “Mi volas bileton por Huaxian.”

Mi preskaŭ eksplodis de kolero, sed pro la multeco de pasaĝeroj ekster la giĉeto, mi min bridis de maldecaĵo. Post pripensado ankaŭ mi flanken klinis la kapon kaj diris: “Ĉu?”

“Mi volas bileton por Huaxian.”

“Ĉu?”

Multaj el la ĉirkaŭstarantoj ekridis brue. La pasaĝero ekkomprenis la situacion kaj forte ruĝiĝis: “Jen kia maniero?!”



“Maniero,” mi diris, “afabla maniero! Kalkulu mem kiom vi ĉu-is, kaj tamen vi perdis la paciencon nur post du ĉu-oj de mi!” Tion dirante mi brue fermis la giĉeton.

Verdire, tiam mi sentis ofendiĝon kaj kolere pintigis la buŝon post fermo de la giĉeto.

Apenaŭ pasis tri tagoj, kiam mi laŭte kverelis kun alia pasaĝero vojaĝanta al Sichuan. La kaŭzo de tio estis, ke li pagis la bileton per plennasztuko da moneroj. Mi diris al li, ke li ŝanĝu ilin en rondsumajn biletojn en butiko, sed li ne konsentis. Mi do simple rifuzis vendi al li la bileton.

Tre forte ni kverelis tiutage. Li paliĝis kaj nomis min knabinaĉo, dum miaj lipoj ekstremis de kolerego kaj rebate nomis lin “rato de Sichuan-provinco”!

En la sekvanta tago post la kverelo estis la Printempa Festo. Malgranda Lu antaŭe interkonsentis kun mi viziti mian hejmon tiutage.

Eble vi ne konas malgrandan Lu. Li nomiĝas Lu Bingxiang kaj laboras kiel viclokomotivisto de la lokomotiva sekcio. Ni enamiĝis de pli ol duonjaro, tamen nuniu el ni povis venki la hontemon kaj informi tion al la familianoj. Ni interkonsentis, ke li unue vizitu mian hejmon je la Printempa Festo, kaj mi vizitu lian hejmon en posta ferio.

Tiutage, mi ellitiĝis tre frue kaj diris tion al la familio kun ĝojo kaj hontemo. Mia patrino maltrankviliĝis kaj grumblis, ke mi ne sciigis ŝin pli frue. Sed poste malgranda Lu alvenis kaj ŝi ĝojiĝis vidante, ke li estas vigla junulo. Ŝi tuj lavis rizon kaj tranĉis viandon. Dum la urĝa preparado de manĝo, ŝi trovis, ke elĉerpiĝis sojo kaj ordonis, ke mi iru aĉeti tuj.

Ĉar tio estis urĝe bezonata, mi do rapidegis. Sed kiu atendis, ke la vendistino renkontis konaton kaj gaje babiladis kun li. Mi atendis longan momenton, tamen ŝi ankoraŭ ne alpaŝis. Mi do devis ŝin voki: “Kamaradino, bonvolu havigi al mi sojon!”

Ŝi jetis al mi oblikvan rigardon, sed ne turnis sian atenton al mi.

“Kamaradino, sojon. . .”

Ŝi alpaŝis kaj diris kun koleraĵo: “Kiel mi povus enboteligi se vi ne malŝtopis la botelon?”

Aŭdinte ŝian orempikan furiozan voĉon, mi ekstuporis: “Kamaradino, kial tiel, mi ja ne venas por kvereli kun vi . . .”

“Ĉu mi volus?”

“Jen kia. . . estas via maniero?”

“Se ne decus mia maniero, mi lernu de vi!”

“Vi . . . vi . . .” mia lango ne plu obeis min. Kaj ni ekkvereladis, unu starante post kaj la alia antaŭ la montrotablo.

Dum mia deĵorado en la sekvanta tago, mi rakontis la historion al miaj gekamaradoj en la biletvendejo, kaj ĉiuj indigniĝis pro tiu maljustaĵo al mi. Dume envenis la partia sekretario Lei, kaj mi rakontis la samon al li.

Finaŭskultinte la rakonton, li diris signifoplene kaj fiksante sian rigardon sur mi: “Estas tre bone, malgranda Han, ke vi indigniĝis pro tia malbona maniero. Vi kaj ŝi ambaŭ okupiĝas pri servado. Vi devas preni tiun okazintaĵon kiel spegulon, ke vi rigardu en ĝi ne nur aliajn sed ankaŭ vin mem en la laboro.” Tion dirante, li prenis leteron el sia poŝo: “Ĝin legu!”

Mi surpriziĝis kaj tuj transprenis ĝin. La letero estis sendita de laboristo de la Fera-Ŝtala Fabriko de Lueyang. Li skribis:

. . . En la komenco de marto, ĉijare, mia edzino estis akuŝonta kaj mi petis per telegramo, ke ŝia patrino venu al Lueyang por helpo. Du tagojn poste responda telegramo informis nin, ke ŝi jam ekveturis.

Sed pasis unu semajno, tamen la bopatrino ne alvenis. Pasis alia semajno, tamen ankoraŭ nenia signo montriĝis. Mi demandis per telegramo, respondo asertis, ke ŝi devus esti alveninta jam antaŭ longe. Kio do okazis efektive?

Sciu, mia bopatrino neniam vojaĝis kaj mia bofrato timis, ke ŝi trafos eraron survoje pro vagonarŝanĝo, tial li speciale skribis la nomon Lueyang sur paperslipo, ke ŝi ĝin kunportu. Elvagoniĝinte ĉe via stacio, ŝi iris al la biletvendejo por aĉeti bileton. Iu kamaradino kun

du mallongaj harligoj post la dua giĉeto ŝin demandis: “Kien?” Ŝi respondis: “Lueyang.” Aŭ pro tio, ke la maljunulino diris neklare, aŭ pro tio, ke la biletvendistino estis ne sufiĉe devokonscia, la biletvendistino akceptis la monon, elprenis unu bileton por Luoyang kaj ĝin eljetis. Mia bopatrino tiam ekmemoris la slipon en la poŝo, kaj ĝin elprenis por montri al la vendistino. Sed kiu atendis, ke la giĉeto brue fermiĝis, antaŭ ol ŝi povis etendi tien sian manon. Ŝi frapis je la klapo plurfoje, sed neniu atentis ŝin. Ŝi do serĉis kamaradojn kiuj scipovis legi kaj al ŝiaj demandoj ĉiuj diris “Luoyang”. Ĉar ĝia prononco malmulte diferencas de “Lueyang”, tial ŝi opiniis, ke ne okazis eraro, tute trankviliĝis kaj ĝoje ekveturis kun la bileto.

La rezulto estas imagebla: tute eraris la direkto, elvagoniĝinte ĉe Luoyang, ŝi migris tutan tagon kaj fine komprenis, ke ŝi misvojaĝis. Mia bopatrino suferis de hipertensio, kaj eksciinte, ke ŝi erare veturis pli ol mil liojn (1 lio=0.5 km.), ŝi svenis kaj falis teren pro

maltrankvilo kaj indigno. Kiam oni portis ŝin al hospitalo por urĝa helpo, ŝi jam estis en dangerego, kaj ŝi kuŝis dekkelkajn tagojn senkonscie.

Poste, la hospitalo telegrafis al mi kaj alsendis sciigilon pri vivdangero de la paciento. Nur tiam ni eksciis, kio okazis, kaj mi haste rapidis al Luoyang. . . .

La akcidento alportis grandan doloron al nia tuta familio, kaj multe pensigis min. En la pasinteco, ankaŭ mi mem iafoje laboris malzorgeme kaj sen deca devosento. Sed la okazintaĵo komprenigis al mi, kiel oni devas trakti sian laboron. En nia lando, ĉiu ajn laboro estas por servi al la popolo, kaj ĉiu el niaj agoj havas striktan kaj gravan rilaton kun la popolamasoj. Sed bedaŭrinde, ĝis nun ankorau nemalmultaj homoj ne konscias tion.

Mi ne scias, kiu estas la kamaradino, kiu faris la eraron, kaj mi ne volas informiĝi pri ŝi. Ja kiu kulpis? Ŝi estis kulpa, kaj tamen ankaŭ nekulpa. Kial en la lastaj jaroj la

## Pri Armand Su



Post elkarceriĝo, Armand Su, ĉina Esperanta poeto reaktivis en la E-movado. Kelkaj ĉinaj tagjurnaloj aperigis artikolojn pri li i. a. pri lia Esperanta aktiveco. Jen la plej gravaj: En la loka tagjurnalo “Tianjin Ribao” de la 27-a de aprilo aperis literatura raporto preskaŭ tutpaĝa pri li (kun foto); en la granda tagjurnalo “Guangming Ribao” en Beijing de la 29-a de la sama monato aperis longa artikolo pri li (kun foto). Samtage la artikolo estis koncize disaŭdigita dufoje en novaj-programo de la Centra Popola Radio de Beijing por la tuta lando, kaj plurfoje disaŭdigita de la Popola Radio de Tianjin en majo. Rezulte de tio, alfluis multaj leteroj petantaj informojn pri Esperanto. Por kontentigi ilin, Armand Su verkis ĉinlingvan artikolon pri Esperanto por “Tianjin Ribao”.

En aprilo en Venecio (Italio) aperis lia unua itallingva poemaro “poesie dalla Cina” (“Poemoj el Ĉinio”). Ĝi inkluzivas liajn poemojn verkitajn dum la tempo de 1950 ĝis 1966 (13-jara — 30-jara). Granda parto estis verkita rekte en la itala, kaj ceteraj estis italaj tradukoj de liaj poemoj el la ĉina kaj Esperanto. Estis enpresitaj liaj biografiaj notoj kaj 7 fotoj (de infanaĝo ĝis nun). La redaktinto estas fama itala poeto kaj ĵurnalisto D-ro Adriano Madaro, kiu venis en Ĉinion kaj renkontis Armand Su fine de aprilo kaj intervjuis lin.

Pro grava malsano — hemiplegio, Armand Su kuŝas en hospitalo ekde 21-a de marto. Li ekinstruis Esperanton al vartistinoj post propagando pri la lingvo.



moroj de la socio fariĝis tiaj? Kial tiel multaj bonaj kamaradoj ricevis malbonan influon? Mi plej multe pensis pri tio. Mi esperas, ke la gvidantoj ne tro multe kritikos tiun kamaradinon. Se estus eble, bonvolu montri al ŝi tiun ĉi leteron. Eble ĝi vidigos al ŝi la devon de popola biletvendisto. . .

Antaŭ finlego de la letero mi jam ne povis min deteni de plorado, kovrante mian vizaĝon per ambaŭ manoj kaj min klinante sur la tablo. Kiel mi pentis! Estus pli bone, se la kamarado forte min riproĉus en la letero. Sed anstataŭ min riproĉi, li ekskuzis min. Laŭ la tono de la letero mi jam vidis, ke li estas klera. Sed mi . . . kion mi faris!

Iom plorinte mi levis la kapon kun mordata lipo: “Sekretario Lei, mi eraris.”

Vidinte ke mi vere pentas, Sekretario Lei diris neniun alian riproĉegan vorton: “Malgranda Han, diru, en kio vi eraris?”

“Mi ne devis tiel trakti pasaĝerojn.”

“Kaj krome?”

“ . . . . . ”

“Malgranda Han,” diris Sekretario Lei, “se mi diros ion eraran, tiam vi kontraŭargumentu. Mi opinias, ke la ĉefa punkto estas tio, ke mankas al vi ĝusta kono pri la laboro de biletvendado. Alie, kial vi, bontemperamenta, agis tiel malpa-

cience al la pasaĝeroj? El la pasaĝeroj kontaktataj de ni ĉiutage iuj iras renkonti siajn karulojn neviditajn dum multaj jaroj, aliaj iras plenumi grandan konstruan objekton por la ŝtato. . . kiom da pasaĝeroj kun brula malpacienco atendas ĉiutage en vico antaŭ la giĉeto! Ja ĉiu ago de ni biletvendistoj strikte ligiĝas kun la konstruado de la lando kaj la vivo de la popolo.” Li paŭzis momenton, ĵetis rigardon al mi kaj daŭrigis: “Ni prenu kiel ekzemplon la kamparanojn en montregiono, kiuj neniam vojaĝas. Vi facile perdas vian bonhumoron pro iliaj multaj demandoj. Tamen ĉu vi pripensis, . . . ĉu ili havis ŝancon veturi per trajno en la malnova socio? Tamen hodiaŭ ili havas! Kvankam ili aspektas ne tiel komprenemaj, tamen efektive ili havas pli profundan senton pri ĉio ol la aliaj. La biletvendistoj povas transdoni al ili varman prizorgon de la Partio kaj Prezidanto Mao kaj havigi al ili la fieron de mastreco al la ŝtato; kaj ili ankaŭ povas vundi ilian koron. Malgranda Han, diru, kion vi donis al ili? . . .”

Sekretario Lei diris tre mallaŭte, en modera rapideco. Sed mi sentis, kvazaŭ mia koro estus peze frapadata de martelo. Mi aŭskultis kaj pripensis kun klinita kapo kaj nedeteneblaj larmoj malsekigis la okulojn.

Tiunokte, mi min turnadis sur la lito kaj maldormis, pro ĉagreno, tra la tuta nokto.

(Daŭrigota)

## VERDA MAJO PREZENTIĜIS EN LA POPOLA ĴURNALO

En la Popola Ĵurnalo de la 19-a de februaro, 1979 publikiĝis artikolo de raportisto de la ĵurnalo pri japana esperantistino Verda Majo — batalantino por la japana-ĉina amikeco. En ĝi la verkinto unue rakontis pri sia intervjuo kun Ozaŭa Juki, pliaĝa fratino de Verda Majo, en la pasinta jaro en Japanio, kaj poste pri la vivo de Verda Majo, precipe pri ŝia aktivado en Ĉinio. La verkinto varme laŭdis ŝian kontribuon por la amikeco inter la japana kaj ĉina popoloj.

## “ELEKTITAJ POEMOJ DE ZHOU ENLAI EN JUNECO”

La nomita poemaro estas eldonita en Beijing (Pekino). Ĝi entenas 14 poemojn verkitaĵojn de Zhou Enlai en la periodo de 1914-1922, inter kiuj troviĝas 7 en klasika stilo kaj 7 en libera stilo. Tiuj poemoj spegulas la vivon de revolucia batalo de la verkinto dum la juneco.

La Popola Literatura Eldonejo aldonis al la poemoj koncizajn klarigojn kaj notojn. En la poemaro estas enmetitaj fotoj kaj manskribajoj de Zhou Enlai.





# ĈIE TROVIĜAS NIAJ AMIKOJ

de MING YUAN

**I**UTAGE en profunda vintro, ni aŭte veturis de Stokholmo kontraŭ neĝblovo, al urbeto Mariephlet por viziti faman svedan verkiston Sinjoron Y. I. Mildar, kiu estas honora prezidanto de la Sveda-Ĉina Amikeca Asocio.

Galopinte ĉ. unu horon sur la soseo N-ro. 33 de Eŭropo, la aŭto ekkuris saltetante sur montvojo dike kovrita de neĝo. La vojo fariĝis pli kaj pli mallarĝa. Ni ne konis la vojon, la brakhorloĝo montris, ke ni jam pasigis multe pli da tempo ol la distanco bezonis. Ni veturis tro malproksime, do ni devis returni la aŭton. Apenaŭ la aŭto sin turnis duoncirkle, la du radoj dekstraflankaj glitis en fosajon kaŝitan sub neĝo, la aŭto paneis. Ni klopodis ĉiamaniere,

tamen la aŭto ne cedis. Kion fari? Tiu loko estas tre maldense loĝata kaj regata de mirinda kvieto. De kiu ni petu helpon?

En turmento de maltrankvilo ni rimarkis ke malproksime sur la soseo aperis nebula lamplumo, kaj post nelonge alveturis limuzino portanta mezaĝajn geedzojn kaj du infanojn malpli-ol-dek-jarajn. La sinjoro haltigis la veturilon kaj petis informon pri la akcidento. Li demandis ankaŭ: "Vi estas ĉinoj, ĉu ne?" La gesinjoroj elaŭtigis, elprenis ŝtalan ŝnuron, kaj senhezite surventre kuŝiĝis sur neĝo por kunligi la du aŭtojn. Poste la sinjoro ekveturigis sian aŭton por elteni la nian. La akra bruo de la motoro skrapis niajn orelojn. Subite, krak! rompiĝis la ŝtala ŝnuro. Tiam la

sinjorino kuŝiĝis surneĝe kaj denove kunligis la du aŭtojn per la rompita ŝnuro, tamen ĝi denove rompiĝis. Tio ripetiĝis foje kaj refoje, ĝis la ŝnuro tute ne plu taŭgis por interligo.

Kvankam ni plene kovriĝis de neĝo, tamen la helpemo de la svedaj geamikoj forgesigis al ni la malvarmon.

Ni ne sciis kion fari kontraŭ la malfeliĉo, kaj tiam alia limuzino atingis nin sub stirado de junulo. La mezaĝaj gesinjoroj sciigis lin, ke aŭto de ĉinaj amikoj falis en neĝon. Li senhezite prenis sian ŝtalan ŝnuron kaj faris la samon. Tamen ankaŭ li malsukcesis. La manoj de nia juna amiko estis makulitaj de oleo kaj la haŭto kre-

## KALEJDOSKOPO

## ĜISMORTA PARO EN SAMA TRUO

La animaloj en la foto estas kaptitaj el profundejo de la Orienta Ĉina Maro fare de la ĉina maresplora ŝipo Dongfanghong. Ili estas kromnomataj "Ĝismorta Paro en Sama Truo" pro sia speciala interrilato. La blanka tuboforma estas speco de vitrospongo (*Hexactinellida*), kies muro konsistas el siliciaj pinglaj ostetoj. La spongo aspektas

kiel bela metiartaĵo plektita el arĝentaj silkaj fadenoj. La paro de salikoketoj estas nomataj paro-salikokoj. Ili parazitis en la spongo kaj estis elprenitaj por fari foton. Tiaj spongoj vivas sur sabla fundo en profunda maro kaj malgrandaj salikokoj kaj kankretoj ofte parazitatas en ili. La paro-salikokoj eniĝis en la spongon, kiam ili estis tre

junaj. Estas mirinde, ke tiaj salikokoj ĉiam pare eniĝas en spongon, kie ili povas vivi komforte kun necesa nutraĵo. Sed kiam ili fariĝis plenkreskaj, ili ne plu povas eliĝi kaj devas tie vivi ĝis la morto. En iuj landoj, oni nomas tian kunvivantaron Venusa Krono kaj prenas ĝin kiel karan donacon por simboli ĝismortan geedzecon.



vis de frosto. Ni admonis lin iom varmigi sin en aŭto. Sed li respondis: "Ĉina slogano diras: 'Timu nek penigon nek morton'. Do tute ne gravas frostovundo al la manoj!" Ni ja ne atendis, ke en tia momento kaj en tia loko fremdlandano familiare eldiris tiujn vortojn bone konatajn de ĉinoj. Kvazaŭ varma fontakvo en frosta vetero, la vortoj varmigis niajn korojn.

La neĝo falis ĉiam pli dense kaj vespera krepusko ekvalis la teron. Kiam niaj svedaj geamikoj sciis, ke ni celas viziti Sinjoron Y. I. Mildar, ili unuvoĉe kriis: "Ha, Mildar, ni konas lin." La mezaĝa paro ĝoje diris, ke ili ambaŭ estas membroj de la Sveda-Ĉina Amikeca Asocio. Ni trankviliĝis. La geamikoj decidis sendi nin per siaj aŭtoj al la hejmo de Sinjoro Y. I. Mildar.

Survoje ni preterpasis etaĝan dometon starantan apud la montvojo. Ene brilis lampo, kaj iu knabino rigardadis eksteren tra la fenestro. Kiam ŝi vidis nian junan amikon kiu stiris la aŭton, ŝi ridete faris mansaluton, kaj tuj embarasite retiris la manon, ĉar li ne haltis. Ni




ne sciis kion tio signifas. La aŭtoj haltis antaŭ unuetaĝa konstruaĵo. Gesinjoroj Mildar kaj aliaj svedaj amikoj eliris el la domo por bonvenigi nin. Ni esprimis dankojn al niaj geamikoj survoje konatiĝintaj, petis ilin prezenti siajn nomojn kaj invitis ilin eniri la domon por ripozo. Radiantaj de ĝojo ili mansvingis dirante: "Ne, ne." Nur tiam la juna amiko klarigis al ni, ke la knabino, kiu mansalutis lin antaŭ momento, estas lia fianĉino. Li ege malfruiĝis por la rendevuo kaj devis rapidi al ŝi.

Post la vespermanĝo, Sinjoro Y. I. Mildar petis iun kamparanon eltreni nian aŭton per traktoro. Parolante pri nia travivaĵo en la tago,


ni diris, ke la agoj de niaj svedaj geamikoj estas "alsendo de karbo en neĝado", kiel ĉina popoldiro esprimas, kaj tio aldonis novajn florojn al la brokato de amikeco inter la du popoloj de Ĉinio kaj Svedio.

Post tiu okazintaĵo, ĉiufoje kiam ni vidis ĉiamverdan pinarbaron aŭ kiam ni iris sur arĝenta neĝo en frosta vintro, ni rememoris tiun honestan mezaĝan paron, tiun junulon, kiu prokrastis sian rendevuon por nin helpi kaj ankaŭ la junan kamparanon kiu stiris traktoron. Iliaj afablaj kaj amikaj mienoj ofte aperas antaŭ niaj okuloj, ilia helpemo kaj ilia amikeco al la ĉina popolo estas neforgeseblaj.



## ARANĜADO DE CIFEROJ

Metu la ciferojn de 1 ĝis 12 en la 12 cirklojn tiel, ke la sumoj de la adiciitaj ciferoj de ĉiu linio kaj tiu de la adiciitaj ciferoj en la 6 cirkloj ĉe la pintoj de la stelo estu egalaj. (Solvo aperas en ĉi numero.)



## Kunlaboro floras en la nova rubriko


Karaj amikoj,

Ĝuste kiam venis la ĉarma printempo, ni malfermis en nia gazeto novan rubrikon "Fotoj pri naturaj belaĵoj". Ni aperigis ekde la 3-a numero belajn fotojn pri pejzaĝoj, floroj, birdoj kaj aliaj. Ili ĉiuj estas fruktoj de diligenta laboro de esperantistoj.

Ni tre ĝojas pro ĝia sukcesa funkciado kaj kore dankas tiujn esperan-

tistojn, kiuj sendis siajn fotojn por la rubriko. Ni esperas, ke pli kaj pli da amikoj kunlaboros kun ni en tio.

Karaj amikoj! Al ni mankas sperto ĉiflanke kaj certe troviĝas mankoj, tial ni sincere petas de vi kritikojn kaj proponojn por bone funkciigi la rubrikon. Sube ni refoje aperigas la anoncon pri la nova rubriko.



Bonvolu doni vian kunlaboran afablecon, por ke la amikeca floro fariĝu pli ĉarma.

La Redakcio de EPC


## Nova Rubriko: Fotoj pri natura belaĵo

De la jaro 1979 funkcias en nia gazeto nova rubriko, en kiu ni aperigas fotojn pri natura belaĵo faritajn de ĉinaj aŭ eksteriandaj esperantistoj. Kun la foto (en grandeco proksimume de 6 koloroj) oni bonvolu aldoni klarigon pri la fotoĵo. Ni ne resendas neuzitajn fotojn. Al sendin-

toj de ĉiuj uzitaj fotoj ni rekompencos per donacajo aŭ memorajo.

Ni atendas kunlaboron de esperantistoj-fotamantoj tra la tuta mondo.

La Redakcio de EPC





### NOVE FONDITA ENTREPRENO: MUZIKA KULTURO

Ĝi celas eldoni muzikaĵojn (diskojn, kasetojn ktp.) en la internacia lingvo, kiuj estos prezentablaj al neesperantista publiko sen honto.

Ĝi ne serĉas nurajn "konsumantojn" de siaj varoj sed kunproduktantojn kaj kundisvastigantojn. Homoj, kiuj kapablu pere de radiostacioj aŭ alimaniere prezenti tiujn ĉi kanzonojn al neesperantistoj, estas aparte bonvenaj. Kontaktoj kaj proponoj dezirataj.

"Horo da opozicio" el 21 prisociaj kanzonoj — kanzonkaseto kontraŭ 3000 italaj liroj (aŭ egalvaloro), pagotaj laŭ instrukcioj.

Adreso: Muzika Kulturo ĉe Centro di Documentazione Esperantista, Via dei Sabelli, 54, 00185 Roma, Italujo. (Laŭ Muziko)

### AMERIKA ASOCIO PRI ESPERANTO-STUDOJ FONDITA

La Asocio estis fondita lastan vintron kun 50 membroj, precipe uni-

versitataj profesoroj. Prof. H. Tonkin estas prezidanto de la Asocio, Prof. Ullman sekretario kaj Prof. R. Wood vicprezidanto. (Laŭ Heroldo de Esp.)

### REAPERIS "INTERNACIA JURNALISTO"

Post kelkvara interrompo reaperis la organo de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio sub ĉefredaktoro Ivan Keremedĉev Esperov (kv. Borovo, bl. 219 B, BG-1680 Sofia, Bulgario). (Laŭ Heroldo de Esp.)

### APERIS "TRA DEZERTO KAJ PRAARBARO" EN ESPERANTA VESTO

La aŭtoro de la originalo estis H. Sienkiewicz Nobel-premiito 1905. La aventuran romanon li verkis en 1910. Temas pri eventplena forkuro de du eŭropaj geknaboj tra suda Egipto kaj Sudano, en la pasinta jarcento dum historia ribelo. Abundas sciencaj kaj natursciencaj observoj. La 316-paĝa volumo kostas 330 bfr. (24 gld., 22 gmk.) aŭ egalvaloro mendebla ĉe UEA.

### INTERNACIA FERIA ALTLERNEJO


La someran sesion de IFA 1979 inaŭguros la faka kolokvo pri porin-

fana literaturo (2-an — 4-an de junio), sed ĝi komenciĝos efektive la 8-an de julio kaj daŭros ĝis 24-a de aŭgusto, kun paŭzo dum la UK-semajno. La kalendaro proponas dek-du aranĝojn, el kiuj du semajnaj kursoj por progresantoj (gvidos Perla Martinelli), du semajnfinaj seminarioj kaj ok semajnaj kursoj por fluaj parolantoj, pri plej diversaj temoj. Inter la lekciistoj oni trovas la nomojn de popularaj esperantistoj kiel Piron (psikologio) kaj Triksini (Biblio), de fakuloj kiel Carlevaro (Volapuk) kaj Penacchietti (kompara lingvistiko), de junaj intelektuloj kiel Lindstedt (ĝenerala lingvistiko) kaj Silfer (literatura kritiko/establotekniko), kaj de protagonistoj de la KCE-aktiveco: August Braun (astronomio) kaj Claude Gacond (pedagogio/turismo).



### MEĤANIZITA KOKO-BREDEJO EN ANTAŬURBO DE BEIJING

La granda koko-bredejo Yukou meĥanizita per eksterlandaj ekipaĵoj estas finkonstruita lastatempe. Ĝi okupas areon de pli ol 19,000 kvadrataj metroj. En ĝi troviĝas 10 domoj por ovokokinoj kaj 4 domoj por kokidoj. Ĝi povas enteni 360,000 kokojn ĉiujare, el kiuj estas 250,000 kokinoj kaj 110,000 kokidoj. Ĉiujare ĝi povas produkti pli ol 3,000,000 kilogramojn da kokovoj kaj liveri al la merkato 250,000 kokojn por manĝo.




La kovejo de la koko-bredejo



### INDUSTRIA EKSPOZICIO DE JUGOSLAVIO EN BEIJING

En aprilo Jugoslavio inaŭguris industrian ekspozicion en Beijing. Ĝi estas alia granda industria ekspozicio de Jugoslavio en Ĉinio post 1971. Inter la ekspozajoj troviĝis ilmaŝinoj, agrikulturiloj, veturiloj, porŝipaj motoroj kaj instalaĵoj de elektra, metalo-prilabora, medicina, kemia kaj farmacia industrioj. Ĝi spegulis atingojn akiritajn de la diligenta heroo popolo de Jugoslavio

*Inaŭguro de la Jugoslava Industria Ekspozicio en Beijing*



sur la vojo de socialismo, sub la gvidado de la Ligo de Komunistoj de Jugoslavio kun Kamarado Tito kiel estro, kaj tre interesis la ĉinajn rigardantojn.

### NOVE KONSTRUITA AERODROMO EN HARBIN

La nove konstruita aerodromo en Harbin, industria urbo de nord-orienta Ĉinio, oficiale ekfunkciis je la unua de aprilo.

La aerodromo ekkonstruita en 1975 taŭgas al diversaj aviadiloj nuntempe uzataj. Antaŭe en la urbo troviĝis nur unu aerodromo por malgrandaj aviadiloj, kaj ĉiusemajne nur unu pasaĝera aviadilo flugis de ĝi al Beijing (Pekino). Sed nun 9 pasaĝeraj aviadiloj flugas ĉiusemajne al 4 urboj en la lando.

### NOVA HIDROELEKTREJO EN SICHUAN

La hidroelektrejo Gongzui, la plej granda en sudokcidenta Ĉinio, kun kapacito de 750,000 kilovatoj estas finkonstruita lastatempe kaj komencis produkti elektron. Ĝi estas plenumita nur per propraj fortoj de nia lando, tiel en projektado kaj konstruado, kiel en fabrikado kaj instalado de la ekipaĵoj.

Ĝia barajo alta je 85 metroj kaj longa je 447 metroj estas konstruita sur Dadu-rivero en gubernio Leshan.

Oni ekkonstruis ĝin en februaro de 1966. Nun la hidroelektrejo ligiĝis kun aliaj elektraj retoj de Sichuan-provinco kaj formis kun ili grandan elektran reton tra la centra parto de la Sichuan-a Baseno.

### ĈINA MEDILOGIA SOCIETO FONDIĜIS

La Ĉina Mediologia Societo fondiĝis en la fino de marto. La kunveno por celebri la fondiĝon ĉeestis pli ol 280 sciencaj esplorantoj kaj inĝenieroj de kemio, biologio, medicino, meteologio, akustiko, oceanografio, media inĝenierado, ekonomiko kaj leĝoscienco k.a. el sciencaj kaj medioprotektaj institucioj. En la kunveno publikiĝis pli ol 180 disertacioj kaj enketaj raportoj pri mediologio.

La societo aranĝos sciencajn raportojn kaj simpoziojn, disvastigos la median sciencon al la publiko, eldonos du revuojn kaj fortigos interŝanĝon pri scienco kun aliaj landoj.

### ALIA ANTIKVA KADAVRO EKSPOZATA

La kvara antikva kadavro elterigita kaj bone konservita de nia lando — kadavro de Zhou Yu, antikva studento de Suda Song-dinastio (1127-1279 p.K.), estis ekspozata en la Muzeo de Zhenjiang de Jiangsu (Giangsu)-provinco en la 10-a de aprilo. Samtempe ekspozataj estis ankaŭ silkaĵoj de Suda Song-dinastio, elterigitaj el la sama tombo, malofte viditaj inter la elfositaj antikvaĵoj de la pasinteco.

La tombo de Zhou Yu estis trovita en julio, 1975, ĉe vilaĝo de Jintan-gubernio de Jiangsu-provinco.

La tombo estas nur je 2 metroj sub la tero kaj entenis nur unu ĉerkon kaj unu ĉerkujon. La ĉerko estis metita en simpla brika ĉambro kun longeco de malpli ol 3 metroj, larĝeco kaj alteco de pli ol 1 metro. La kadavro estis mergita en likvaĵo



kaj konserviĝas tiel bone, ke la hararo ne falis, la artikoj grandaj kaj malgrandaj de la tuta korpo estas moveblaj, la manoj pugnigebaj, la brakoj leveblaj kaj la trunko povas esti sidigita kaj kuŝigita. La kadavro havas aromon de abio same kiel la ĉerko.

### KATOLIKOJ CELEBRIS PASKON

Ĉ. 500 ĉinaj kaj fremdlandaj katolikoj ĉeestis la meson en Xiuanwumen-preĝejo de Beijing je la 15-a de aprilo por celebri Paskon.

Shi Yukun, pastro de la preĝejo, gvidis la ceremonion. Ĝin ĉeestis pli ol 250 fremdlandaj katolikoj el 27 landoj, inter kiuj troviĝas diplomatoj de ambasadoj en Ĉinio, delegacioj Ĉinion vizitantaj kaj fremdlandaj specialistoj kaj studentoj en Ĉinio. Multaj el ili ricevis sanktajn karnon kaj sangon en la ceremonio.

Samtempe, ankaŭ protestantoj en Beijing ĉeestis paskan aktivadon en protestanta preĝejo ĉe la strato Mishi de Beijing.

### ĈINA ANTIKVA FAJENCAJO TROVITA EN JAPANIO

Du-kolora glazurita fajencaĵo de la lasta periodo de Tang-dinastio (618-907 p. K.) de Ĉinio trovita en Japanio vekis atenton de koncernaj rondoj.

La fajencaĵo estis elterigita ĉe la Templo Bodai de urbo Amagi de la gubernio Fukuoka en la pasinta jaro. Ĝi estas kolorigita verde kaj glazurita blanke. Ĝi altas je 20.5 centimetroj, la diametro de la bazo estas 15 centimetroj kaj sub la supra aperturo troviĝas enversa truo kun

longeco de tri centimetroj. Laŭ la formo ĝi estas kruĉo.

Ĉinaj specialistoj opinias, ke ĝi estas bakita en Changsha (Ĉangŝa) de Ĉinio antaŭ pli ol 1,000 jaroj. Malmulte da tiaj du-koloraj glazuritaj vazoj de Tang-dinastio estas trovitaj en Ĉinio, tial ĝi estas valora materialo por studi la historion de la kultura interŝanĝo de Ĉinio kun Japanio kaj la disvolvigo de antikva ceramiko de la du landoj.

### LA LIONA SIMFONIA FILHARMONIA TRUPO EN ĈINIO

La Liona Simfonia Filharmonia Trupo de Francio gvidata de urbestro Collomb vizitis Ĉinion en aprilo. Ĝi estis la plej granda trupo sendita de Francio al Ĉinio de post la fondo de la diplomatia interrilato inter Ĉinio kaj Francio. La trupo konsistas el 108 muzikistoj, inter kiuj troviĝas fama franca direktisto Serge Baudo, fama unua violonisto Bauer Milan kaj aliaj dekoj da muzikistoj kun relative alta nivelo. La trupo faris kvar prezentadojn en Beijing kaj Shanghai kaj ricevis varman aplaŭdon de la aŭskultantoj.

### EKSPOZICIO DE FRANCAJ MUZIKILOJ EN BEIJING

Antaŭ vizito de la Liona Simfonia Filharmonia Trupo al Ĉinio, la ekspozicio okazis en Beijing, kaj poste en Shanghai.

Inter la ekspoziciaj troviĝis antikvaj muzikiloj kiel harpo, orgeno, violono, trumpeto kaj timpano el la 18-a jarcento konservataj de la Muzikila Muzeo de la Ŝtata Konser-



*La Liona Simfonia Filharmonia Trupo sur scenejo de Beijing*



*Parto de la ekspoziciaj francaj muzikiloj*

vatorio de Parizo; kaj pli ol 100 modernaj muzikiloj produktitaj de diversaj grandaj francaj kompanioj de muzikiloj, inkluzive de kordaj muzikiloj, blovinstrumentoj kaj perkutinstrumentoj; krome ankaŭ bluplanoj pri muzikiloj kaj iloj por muzikil-farado de Francio. Samtempe kun tio ekspozitaj estis ankaŭ fotoj pri muzikilfarado.

Inter la rigardantoj estis multaj muzikludistoj kaj esplorantoj kaj produktantoj de muzikiloj. Ili tre interesiĝis pri la ekspozitaj muzikiloj. Iuj el ili prove ludis trumpeton, klarineton k.a. kaj laŭdis ilian bonkvalitecon.

*Supera Toniko*  
KUN MARKO "PINO"

# FORTEGA ABELREGINA GELATO

Indiko:  
Fortikigo de korpo  
Beligo kaj tenado de la haŭtkoloro

Pakado:  
30 kapsuloj por ĉiu botelo  
unu kapsulo por ĉiu tago

Kun plej multa enteno de natura  
abelregina gelato kaj ginsengo

Eksportanto:  
Tianjin-a Branĉo de Lokaj Produktaĵoj de la Ĉina Ŝtata Importa kaj Eksporta Kompanio de Lokaj Produktaĵoj kaj Animalaj Flankproduktaĵoj

Adreso: 33, Harbin-strato, Tianjin

Telegrafa adreso: "DRUGS" Tianjin



## ABELO-GELATO EL FLOROJ

de MA YANNIAN

**S**UR la vastega tero de Ĉinio sin trovas pompe florantaj floroj en ĉiu sezono, kiuj kreis favoran kondiĉon por abeloj produkti mielon seninterrompe en la tuta jaro.

La abelinoj kolektas nektaron kaj preparas mielon, sed ili estas multe malpli grandaj ol la abelregino. La

vivo de abelregino estas ĝenerale 20-oble tiom longa kiom tiu de ordinara abelino. Tiun diferencon kaŭzas la malsameco de iliaj nutraĵoj; la abelregino nutras sin per la kremo de mielo — duontravidebla gelato sekreciita el glando de abelino, sed la ordinara abelo manĝas nur mielon. La abelogelato, alinome abelregina gelato, estas manĝaĵo por la abelidoj dum la unuaj tri tagoj post sia naskiĝo, sed la abelregino ĝin ĝuas dum la tuta vivo. Ĉar abelogelato entenas multajn nutraĵojn kaj estas malmulte entenata en mielo, delonge oni rigardas ĝin supera toniko.

Sciencan analizon pruvis, ke en abelregina gelato troviĝas multspecaj nutraĵoj asimileblaj de la homokorpo, kiel ekz. proteino, graso, amina acido, pluraj vitaminoj kaj glukozo. Ĝi estas uzebla tute sen malbona efiko tiel al viroj kaj virinoj kiel al maljunuloj kaj infanoj. Ĝi povas stimuli apetiton, digestadon kaj metabolon, redukti kolesterolon, fortikigi korpon kaj beligi kaj tenadi haŭtokoloron.


Por pliigi la tonikan efikon de abelregina gelato, la farmaciistoj de nia lando aldonis al ĝi konvenan kvanton da ginsengo post esplorado.





# Verkoj de Fotistoj

Turo ĉe angulo de la ĉirkaŭ-  
muro de la Imperiestra Palaco  
de Jin Bohong



Cignoj  
de Zhang Ju




Rememoro kaj Espero  
de Liu Shizhao





Kanto de Juneco  
de Liu Shizhao



# Ĉinaj Pentraĵoj



Leopardo  
de Li Yan

山鬼乘  
之屈子  
聞之  
氣絕

Montpintoj de Xihai  
de Li Xiaoke



西海群峰  
五十年  
可  
畫  
李肖可





Shen Xueren  
[Red Seal]

Vinberoj  
de Shen Xueren

